

Mensuel
Numéro 57
Août-Septembre
2009

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto : vers une culture sociale sans frontières.



3a-6a de aprilo 2010 : ni kongresos

Guy Martin (cc-by-ca)



ĉe la
**San-Briega
Golfeto**
(Baie de Saint-Brieuc)

Parolu hejmsperanton en la ĉiutaga vivo !

Flora ricevis de Budapeŝto tiun reagon al la recepto por *porea torto* (LS55):

Kara Sinjorino!

Kun intereso mi legas la receptojn en la revuo La Sago.

En la lasta numero rilate al porea torto mi havas iom embarason. Ĉe ingrediencoj inter aliaj estas listigitaj murbo kaj likva kremo.

Mia unua demando estas: kiel oni preparas murbon? Ĉu ĝi estas sala aŭ dolĉa pasto?

El kio konsistas likva kremo? Ĉu laktokremo? Ĉu dolĉa aŭ acida?

Mi petas Vin, pensu ankaŭ pri eksterlandanoj, kiuj eble havas aliajn esprimojn pri certaj ĉiutagaj francaĵoj.

Kun anticipa danko,

István Mészáros

Tiu reago estas duoble interesa, unue ĝi montras ke LS estas legata eĉ en Hungario kaj due ĝi montras la utilecon de artikoloj kiaj tiuj de Flora.

Memoru la reagon de nia kamarado Marc Noulin (LS53): «*mi bedaŭras la nunan evoluon, kiu pli favoras la rubrikon pri kuirreceptoj ol tiun pri «Eo aktivas». Ne kuraĝiga konstato!*»

Sed jen la realo: ekde la naskiĝo de La Sago, la rubriko «*Esperantistoj aktivas*» vekis neniun reagon, dum la Florajoj en malpli ol dek kvin artikoloj vekis jam multajn - eĉ se ĝenerale temas nur pri detalaj precizigoj aŭ petoj/proponoj por onta recepto.

Ĉu oni deduktu ke la legantoj ne interesiĝas pri la «*Ea aktivado*»? Mi kredas ke pli certe, la priskribo de tiuj aktivaĵoj ne starigas problemojn: kompreni kiel oni inaŭguris novan statuon de Zamenhof aŭ novan «*Straton Esperanto*», kompreni kiel oni malfermis kurson por komencantoj aŭ ricevis «*Verdan Stelon*» gastigante la lokajn ĵurnalistojn, tio ne povas veki reagojn krom gratuladon, ĉar ja tiuj situacioj estas tre kutimaj.

Kaj jen unu afero – kiu ankaŭ aspektas tre kutima – «*likva kremo*» levas reagon de hungara leganto: «*Kio do estas tiu likva kremo?*»

Eĉ se reference al PIV, li povus ŝpari la demandon «*Ĉu laktokremo?*» (ĉar en kuirarto ne povas temi pri la signifo *kuracila aŭ kosmetika ŝirmaĵo* - krom eble en tre avangarda kuirarto...;-) tamen restas pravigebla la posta demando: «*Ĉu dolĉa aŭ acida?*»

La acida kremo ne kutimas en la tradicia franca kuirarto, kaj francaj legantoj verŝajne estus surprizitaj se Flora skribintus «*20 cl da likva kremo ne acida*», detalo tamen necesa por Hungaro. (Cetere Flora respondis al sia korespondanto, ke se temas pri acida kremo, ŝi uzus la vorton «*jogurto*» -tute alia afero-, kio bone reliefigas ke «*acida kremo*» estas fremda al franca kuirarto.)

La ĉi-numera recepto «*Tinusa gratenajo*» jam antaŭ publikigo levis reagon, tuj okaze de la korektado: ĉu 150 g da *tinuso* aŭ 150 g da *tinusaĵo*?

Se referenci al PIV, «*tinuso*» en sia signifo 3, estas la karno de la koncerna besto. Tio valoras por ĉiuj fiŝoj.

Ĉu tio fontas el la Zamenhofa esprimo: «*tio estas nek viando nek fiŝo*»? Unu klarigo proponita estas ke fiŝoj, ĝenerale malgrandaj, konsistigas unupersonan porcion, kaj do oni ne manĝas «*trutaĵon*» kio estus parto de truto, sed la tutan truton. Mi bonvolas (tamen mi mem preferas ne manĝi la kapon kaj la ostojn, kaj kontentiĝi per la trutaĵo - karno de truto!). Cetere por nefiŝaj bestoj de sama grandeco, ĉu oni manĝas kolombon aŭ kolombaĵon? PIV parte respondas por perdrikoj, «*kies karno estas bongusta*» proponante «*perdikidojn sur toasto*» (kvankam mi ne konas la recepton, mi supozas ke la bestojn oni iom preparis, minimume forigante la plumojn...)

Grandeco ne klarigas ĉion: ja heliko, sufiĉe malgranda besto, ne estas manĝata, sed ja helikaĵo...Demando pri alia molusko: ĉu vi manĝas mitulon aŭ mitulaĵon?

Se tiu malhomogeneco trapasis plurajn reviziojn de PIV, tio bone montras ke kvankam «*ĉiutagaj*» tiuj vortoj estas malofte uzataj.

Resume, por konsideri Esperanton vivanta lingvo, oni ne kontentiĝu per vorttrezoro kiu rilatas al kongresoj, inaŭguroj, organizadoj de kursoj kaj aliaj movadaj aktivaĵoj. Ja necesas ke la ĉiutagavorttrezoro ne estu stumbligaro, kaj do, plu utilas rubrikoj kiel tiu de Flora, eĉ devus esti aliaj samspecaj, kaj tiuteme oportune aperas nova rubriko «*Legindaj Legendoj*» verkata de Cecilia en «*hejmsperanto*». (Vidu paĝon 8)

Serĝo

Noto: Pri murbo, Flora klarigos en onta recepto.

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
Ni kongresos...
- 2 EFK-SAT Ĵus aperis.
Flore kuiru.
BildDeliraĵo.
- 3 Parolu hejmsperanton !
- 4-6 Unua Internacio
- 7-8 Ĉu al monda mono ?
- 8 Leginda Legendo

Supplément en français

- 9 Un logo pour SAT-am.
- 9-10 Défense des langues (3ème et dernière)
- 11 Ça bouge../Cours
- 12 BD, SF, et espéranto.
- 13 Reago al Kontribuo al Vikipedio
Utilaj informoj
- 14 Libroservo
- 15 Libro vivas pli longe ol unu sezono:
Lorjak
- 16 Kiel esperantigi proprajn nomojn - 10
- 18-20 Esperantistoj aktivas.

Pri la kongreso 2010 pliaj informoj ekde la onta numero

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Elisabeth	Barbey
Cecilia	
JoLo	Co
Janine	Dumoulin
Geneviève	Gaubert
Louis	Gohin
Maryvonne	Houviez
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Flora	Markov
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Guy	Martin
Line	Maurel
Alain	Ponsero
Jean	Selle
Bernard	Sergent
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant


La Internacia Laborista Asocio (1864 - 1876)

alinome Unua Internacio

Kiam oni rigardas la internaciismon kiel ĝeneralan idearon favore al tio, kio konkordigas la homojn anstataŭ malkonkordigi ilin, tiam ĝi montriĝas tre malnova. La fenomeno antaŭis al la vorto, kiu aperis en relative freŝa tempo: en la vortaro *Grand Dictionnaire universel du dix-neuvième siècle* (Granda Universala Vortaro de la 19-a jarcento) publikigita en la jaro 1873, troviĝas la terminoj *international* kaj *internationale*, sed ne la vorto *internationalisme*; ĉi-tiu lasta aperis nur en la jaro 1879 en la suplemento al la vortaro *Dictionnaire de la langue française* (1863 - 1872) verkita de la filologo Litreo (*Maximilien Paul Emile Littré*, 1801 - 1881).

La internaciismo pli-malpli identiĝas kun defendo de la paco en la rilatoj inter ŝtatoj kaj inter diversaj komunumoj. En Britio, la laboristaro estis stampita per la metodismo aperinta en la 18.a jarcento en la sino de la anglikanismo, do estis influita de la kristanismo. En Francio, la internaciista tradicio fontas el la revolucia movado de la jaro 1789. Okaze de parolado antaŭ la Leĝdona Asembleo (1791 - 1792), la deputito Inardo (*Isnard*, 1751 - 1825) esprimis sin en la jena maniero: «...la popoloj brakumos unu la alian antaŭ la detronigitaj tiranoj, antaŭ la konsolita tero kaj la kontentigita ĉielo».

La alia temo de la internaciismo koncernas la federismon. En sia «Projekto de ĉiama paco», la germana filozofo Kantio (*Emmanuel Kant*, 1724 -



1804) diris, ke la ŝtatoj «devas rezigni, kiel la unuopuloj, sian sovaĝan liberon, por kontentiĝi per la publika trudado de la leĝoj kaj tiel formi regnon de la nacioj (latine *civitas gentium*)». En la jaro 1834, la itala revoluciisto Mazinio (*Giuseppe Mazzini*, 1805 - 1872) fondis la movadon «Juna Eŭropo», kiu estis antaŭprezento de eŭropa federio en la kadro de internacia respubliko pli-

malpli socialista. La franca filozofo kaj ekonomikisto Sansimono (*Claude Henri de Rouvroy de Saint-Simon*, 1760 - 1825) sugestis la kreon de eŭropa registaro laŭ la usona kaj svisa modeloj.

En la jaro 1862, franca laborista delegitaro iris en Londonon okaze de la tiea universala ekspozicio, kaj estis en rilato kun aktivuloj de britaj korporaciaj laborsindikatoj (anglalingve *trade-unions*). En julio 1863, la interrilatoj daŭris okaze de mitingo favore al la liberigo de Polio tiam partigita inter Aŭstrio, Prusio kaj Rusio. La franca reprezentantaro konsistis el 6 parizanoj: 2 bronzistoj, 2 mekanikistoj, 1 masonisto kaj 1 ĉemizisto; inter la bronzistoj troviĝis la reformisto Toleno (*Henri Louis Tolain*, 1828 - 1897), kiu montriĝos malfavora al la Pariza Komunumo en la jaro 1871. La interrilatoj kondukis al la aperigo de rezolucio de la britaj laboristoj destinita por la francaj. Toleno proponis estigon de internacia kongreso. Fine, lastegaj intertraktoj okazis pere de franca respublikisto, kiu iris en Londonon, por partopreni en varma akcepto preparita de britaj laboristoj al la itala revoluciisto Garibaldi (*Giuseppe Garibaldi*, 1807 - 1882) en la printempo 1864.

Dum restado en Londono, Toleno kaj du aliaj fancaj laboristoj ĉeestis en mitingo okazinta la 28-an de septembro 1864 en la kunvenejo *Saint Martin's Hall*, kie la partoprenantoj aprobis la francan proponon krei sekcion en ĉiuj eŭropaj landoj, sub la gvidado de centra komitato. La partoprenantoj elektis provizoran komitaton, kiu konsistis el 21 britoj, 10 germanoj inkluzive de la filozofo kaj ekonomikisto Markso (*Karl Marx*, 1818 - 1883), 9 francoj, 6 italoj, 2 svisoj kaj 2 polaj enmigrintoj; tiuj komitatoj havis la rajton alekti. Sur la socia kampo, la laboristoj konsistigis la plejmulton, sed troviĝis ankaŭ advokatoj, politikistoj kaj filantropoj, kiuj apartenis al kosmopolitaj radikalaj demokrataj medioj. Sur la ideologia kampo, renkontiĝis marksistoj, liberaluloj, adeptoj de la idearo de la anarkiisto Prudono (*Pierre Joseph Proudhon*, 1809 - 1865), eksaj membroj de la brita laborista movado nomita ĉartismo ĉirkaŭ la jaro 1838, membroj de britaj korporaciaj laborsindikatoj kaj diverstendencaj socialistoj.

En oktobro 1864, subkomitato prenis sur sin la taskon ellabori provizoran statuton kaj principan deklaron. Markso, kiu reprezentis neniun laboristan organizaĵon, decidige partoprenis en la redaktado de la provizora statuto kaj

de la inaŭgura rezolucio. La provizora statuto aparte antaŭsciigis, ke la Ĝenerala Konsilio estos ĉiujare elektata en kongreso kaj «konsistos el laboristoj apartenantaj al la diversaj landoj (anglalingve *countries*) reprezentitaj en la Internacia Laborista Asocio».

La Manifesto aŭ inaŭgura deklaro de la Internacia Laborista Asocio (ILA) entenis konsiderojn pri la vivkondiĉoj de la laboristoj: «... la mizero de la laboristaro ne malkreskis inter la jaroj 1848 kaj 1864, dum periodo, kiu distingiĝas disde aliaj per senekzempla disvolviĝo de la industrio, per eksterordinara kreskado de la komerco».

En Francio, komence la ILA eniĝis ĉefe en Parizon, Lionon kaj Marsejlon. Multaj sekcioj, kies ekzisto estis iufoje nominala, aperis en malpli grandaj urboj: Kaeno (*Caen*), Orleano (*Orléans*), Nanto (*Nantes*), Rueno (*Rouen*), Kastelnodario (*Castelnaudary*), Aŭĉo (*Auch*) ekzemple. ILA-anoj varbiĝis ne nur inter la manlaboristoj, sed ankaŭ inter la studentoj kaj aliaj profesiuloj. Dum kelka tempo, la fakto, ke la ILA-sidejo troviĝis en Londono, estigis manieron transpaŝi la malpermeson fondi asociojn, kiuj membras pli ol 20 membrojn. De alia flanko, ILA-sekcioj eniĝis pli-malpli senpere en jam ekzistantajn organizaĵojn kiel laboristajn kooperativojn.

En Belgio, kiu estis, post Britio, la plej industriigita lando el Eŭropo, la ILA baziĝis sur eksaj racionalistaj grupoj, sur liberpensulaj kaj mutualaj societoj. La belgaj ILA-anoj daŭre restos stampitaj per la influo de la demokrataj kaj respublikistaj societoj, kies membroj ili antaŭe estis, kaj per tradicioj devenantaj de la laborkompanaroj (franclingve *compagnonnages*).

En Svisio, ILA-sekcioj kreiĝis en Ĝenevo, Laŭzano, Veveo (*Vevey*), Montreŭo (*Montreux*); en ili troviĝis francaj, germanaj kaj italaj respublikistoj, eksaj revoluciistoj de la jaro 1848, lionaj laboristoj elmigrintaj pro ekonomiaj kialoj, ĝenevaj radikaluloj, mutualistoj, animantoj de pli-malpli sekretaj societoj. En la berna kaj novburga Ĵuraso (*Jura bernois* kaj *neuchâtelois*) ILA-sekcioj dissemiĝis el de Ĉaudefono (*La Chaux-de-Fonds*), kiu fariĝos unu el la citadeloj de la Internacio danke la influon de kuracisto prizorganta malriĉulojn. En Bazelo, la pasamentistoj, kies metio estis perturbita pro ŝanĝigoj de la virina modo, amase aliĝis al la ILA komence de la jaro 1866. En ĉi-tiu lasta jaro, dum la ILA-kongreso okazinta en Ĝenevo ĉeestis 15 svisaj sekcioj,

4 francaj kaj 3 germanaj. En aŭgusto 1867, kreiĝis sekcio en Zuriko.

En Italio, la partopreno de la laboristaro en la ILA ne grave konkretiĝis pro pluraj kialoj: - la laboristaj societoj estos pli-malpli malaktivaj ĝis la jaro 1871; - Mazinio estis rezerviĝema rilate internacian asocion, kiu konkuris kun la temo de lia movado «Juna Eŭropo»; - la depostuloj pri la nacia unueco repuŝis ĉiujn aliajn zorgojn.

Nomumita korespondanta sekretario de la Ĝenerala Konsilio por Germanio, Markso petis eksajn membrojn de la Komunista Unuiĝo fondi sekciojn en Berlino kaj en Rejnlando. Du politikaj korespondantoj de Markso kreis kaj animis ILA-sekciojn en Majenco (*Mainz*) kaj Solingeno (*Solingen*). Spite tiujn klopodojn, en Germanio la disvolviĝo de la ILA estis barita pro la fakto, ke la ĉefa laborista organizaĵo - la Ĝenerala Asocio de la Germanaj Laboristoj (germanlingve *Allgemeine Deutsche Arbeiterverein*) inspiriĝis el la idearo de la germana reformista socialisto Lasalo (*Ferdinand Lassalle*, 1825 - 1864) kaj serĉis solvon de la sociala demando en interkonsento kun la registaro de la prusa ĉefministro Bismarko (*Otto von Bismardk*, 1815 - 1898).

Relative alta ekonomia konjunkturo ebligis esperi plibonigon de la laboristaj vivkondiĉoj. El inter la sensaciaj depostuloj troviĝis jenaj: - en la jaro 1865, la parizaj bronzistoj strikis por la 10-hora labortago, kaj en la jaro 1867 kontraŭ la mastroj, kiuj postulis, ke iliaj dungitoj ne aliĝu al solidarsocieto oficiale ligita kun la ILA; - en la jaro 1868, 3000 ĝenevaj konstruistoj depostulis la 10-horan labortagon kaj minimuman salajron; - sekve de salajraj reduktoj kaj de maldungoj vasta depostula movado trafis belgajn industriajn regionojn en la jaroj 1868 kaj 1869; - en Francio, dum la tuta jaro 1869 severaj strikoj okazis en la teksumaj kaj minejaj regionoj kaj en la plejparto de la grandaj industriaj urboj.

La registaroj kulpigis la Internacion pri tiuj strikoj. Fakte, la ILA nur klopodis, por estigi solidarecon inter laboristoj de malsamaj branĉoj kaj landoj, sen konkrete sukcesi. Tamen la sukcesaj strikoj venigis laboristojn al la ILA kaj al mutualaj societoj, sed ankaŭ al rezistaj grupoj preskaŭ similaj al la estontaj laborsindikatoj.

En Belgio, la registaro volis ĉiujare rekrutigi 13000 soldatojn anstataŭ 10000. Tiu projekto naskis ondon da protestoj, kaj fondiĝis ligo kontraŭ la konskripcio kaj la konstantaj armeoj; kontraŭmilitismaj mitingoj ebligis kontaktojn inter ILA-anoj kaj pacistoj en pluraj urboj. ILA-sekcioj kunigis laboristojn de diversaj profesioj

en difnita komunumo. Tiuj sekcioj federigiĝis sur regiona bazo: nur 1 federo ekzistis en Flandrio, sed 7 aperis en Valonio en la jaro 1869.

En Francio, multiĝis korporaciaj ĉambroj gvidataj de ILA-anoj. Ĉe la fino de la jaro 1869, la ĉefaj laboristaj societoj de Parizo kuniĝis en federa ĉambro, kies animantoj estis ILA-anoj interalie la bindisto Varlino (*Eugène Varlin*, 1839 - 1871).

En Hispanio, jam de la fino de la jaro 1865 estis federigitaj la 40 korporacioj reprezentitaj en laborista kongreso okazinta en Barcelono. Eksciinte tion, la Ĝenerala Konsilio de la ILA nomumis la socialiston Lafargo (*Paul Lafargue*, 1842 - 1911) korespondanta sekretario por Hispanio. En la jaro 1869, sendito de la rusa anarkiisto Bakunino (*Mikhail Aleksandrovitch Bakounine*, 1814 - 1876) sukcesis fondi la unuan ILA-sekcion en Barcelono.

En Germanio, pluraj gvidantoj de la Ĝenerala Asocio de la Germanaj Laboristoj rompis la rilatojn kun ĉi-tiu lasta kaj fondis, en kunlaborado kun la socialistoj Bebelo (*August Bebel*, 1840 - 1913) kaj Libkneŝto (*Wilhelm Liebknecht*, 1826 - 1900), la Social-Demokratian Laboristan Partion en la jaro 1869. La programo de tiu partio entenis la terminojn de la antaŭparolo al la ILA-statuto, kaj Libkneŝto invitis la membrojn individue aliĝi al la Internacio.

Post la ILA-kongresoj okazintaj en Ĝenevo, Laŭzano kaj Bruselo respektive en la jaroj 1866, 1867, 1868, grava turnopunkto estiĝis en Bazelo, de la 5-a ĝis la 12-a de septembro 1869. Tiu kongreso estis aŭtente internacia: partoprenis 27 francaj delegitoj, 24 svisaj, 10 germanaj, 6 britaj, 5 belgaj, 2 aŭstraj, 2 italaj, 2 hispanaj, 1 usona. Ĝi estis aparte stampita per 2 rezolucioj:

- «La Kongreso deklaras, ke la socio rajtas aboli la individuan proprieton de la grundo kaj enigi la grundon en la komunumon»;

- «La Kongreso opinias, ke ĉiuj laboristoj devas aktive klopodi, por krei rezistajn societojn en la diversaj metiistaroj».

Kelkajn tagojn antaŭ la eksplodo de la franca-germana milito en julio 1870, la parizaj ILA-anoj vane publikigis manifeston: «Rilate demandojn pri supereco aŭ dinastio la milito povas esti nur krima absurdaĵo en la okuloj de la laboristoj». La 4-an de septembro 1870, la respubliko estis proklamita sekve de kapitulaco de franca armeo en Sedano kaj malliberiĝo de Napoleono la Tria (1808 - 1873). En la nomo de la ILA, Markso avertis la francajn laboristojn kontraŭ ĉia tro frua revolucia provo: «Kviete kaj rezolute la laboristoj profitu

de la respublika libereco, por metode estigi sian klasan organizaĵon».

La 8-an de septembro 1870, Bakunino



venis de Ĝenevo, por kuraĝigi ribelantojn, kiuj ekokupis la urbodomon de Liono kaj proklamis la abolon de la ŝtato, sed la afero fiaskis. Okaze de la balotado pri la nacia asembleo, kiu estiĝis la 8-an de februaro 1871, la plimulto de la deputitoj estis burĝaj radikaluloj, sed parizanoj elektis 2 ILA-anojn: Malono (*Benoît Malon*, 1841 - 1893) kaj Toleno.

La popola insurekcio, kiun malkonsilis Markso, komenciĝis la 18-an de marto 1871 en Parizo. La ILA-anoj preskaŭ ne partoprenis en la konsistigo de la Centra Komitato de la Nacia Gvardio, kiu iniciatis la ekribelon. En la Konsilio de la Pariza Komunumo, dudekelke da ILA-anoj enviĝis inter la socialista malplimulto opozicianta al la jakobena kaj blankiista (*) plimulto.

Kiam la Pariza Komunumo estis subpremita, tiam multaj ILA-anoj estis arestitaj aŭ devis ekziliĝi. En junio 1871, la ministro pri la Aferoj Eksterlandaj Favro (*Jules Favre*, 1809 - 1880) sendis al ĉiuj eŭropaj registaroj cirkuleron, por sugesti ian specon de eŭropa kontraŭsocialista koalicio. ILA-anoj estis persekutataj en Aŭstrio, Hungario, Danio, Hispanio, Italio, sed la belga, brita, nederlanda kaj svisa registaroj ne sekvis la cirkuleron de Favro. En Germanio, la kanceliero Bismarko ne volis atenci la leĝajn organizaĵojn de la socialdemokratio, kiuj ne estis en rilato kun la ILA, sed Bebelo kaj Libkneŝto estis kondamnitaj al 18-monata malliberigo en marto 1872.

La subpremo de la Pariza Komunumo ne sufiĉis, por malaperigi la ILA-on, kiu profunde enradikiĝis en Hispanio, Hungario kaj Italio post la jaro 1871. En Rusio, la ILA-idearo senpere kontribuis al la konceptoj de la intelektula movado opozicianta al la carismo.

Fakte, la ILA estis dividita en du tendencojn: tiun de la trudemuloj (franclingve *autoritaires*) gvidataj de

Markso kaj tiu de la kontraŭtrudemuloj (franclingve *antiautoritaires*) instigataj de Bakunino.

Koncerne la demandon pri la interna disciplino de la ILA, la kontraŭtrudemuloj postulis plenan memstarecon de la sekcioj aŭ naciaj federoj kaj la finon de la «diktatoreco de la Ĝenerala Konsilio». Koncerne la demandon pri la sinteno de la laborista movado rilate la politikon, ili pledis por revolucia abolo de la subpremanta ŝtato kaj por intertempa plena sindeteno en la politika vivo.

Fuĝinta el Siberio, Bakunino ĝuis grandan prestiĝon en la okuloj de la demokratoj kaj partoprenintoj en la revolucioj de la jaro 1848. Li aliĝis al la ILA-sekcio de Ĝenevo nur ekde la jaro 1868. Liaj subtenantoj grupiĝis en nova organizaĵo: la Internacia Ligo por la Socialista Demokratio (franclingve *Alliance internationale de la Démocratie socialiste*). En Londono, la Ĝenerala Konsilio rifuzis la aliĝon de tiu organizaĵo, tro fortika, al la ILA, sed akceptis tiun de la Ĝeneva Ligo por la Socialista Demokratio.

La marksistoj disponis plimulton en la Ĝenerala Konsilio. Ili apogis sin sur germanaj social-demokratoj kaj ankaŭ sur aŭstroj. En Svisio, la romanda federo kaj la sekcioj de Bazelo, Lucerno kaj Zuriko konsistigis esencan punkton de apogo. Al la reto da amikoj de Markso aldoniĝis kelkaj izolitaj sekcioj en Italio, malgrandaj federoj en Britio, Hispanio kaj Portugalio, dissemataj elementoj en la nederlandaj sekcioj kaj la nord-amerika federo konsistanta preskaŭ ekskluzive el germandevenaj laboristoj.

La plejmulto da bakuninistoj troviĝis en Belgio, Hispanio kaj Romandio (Svisio). En Hispanio, ekde la jaro 1868 preskaŭ ĉiuj sekcioj estis aliĝintaj samtempe al la ILA kaj al Internacia Ligo por la Socialista Demokratio spite la madridan grupeton animatan de Lafargo, la tiea delegito de la Ĝenerala Konsilio. Bakuninistoj estis ankaŭ dissemataj en Aŭstrio, Britio, Francio, Nederlando kaj Usono.

Post la ILA-kongreso en Bazelo, akriĝis la malkonsento inter Markso kaj Bakunino. Antaŭ kelka tempo Markso estis skribinta al sia socialista amiko Engelso (*Friedrich Engels*, 1820 - 1895) la jenon: «Tiu ruso evidente volas fariĝi la diktatoro de la laborista movado. Li atentu! Alie li estos ekskomunikita». Fakte, la debato okazis en

ĝenerala konfuzo: estis malfacile distingi marksistojn disde bakuninistoj en la amaso da delegitoj. Kontraŭ opiniesprimo prezentita de Markso, Bakunino proponis propran rezolucion, kiu estis adoptita de la plimulto de la delegitoj, kaj proklamis «la neceson plene kaj senrezerve aboli la rajton pri heredeco».

Dum konferenco okazinta en Londono en septembro 1871, Markso disponis la voĉojn de 13 el la 23 delegitoj: do li facile adoptigis siajn tezojn por la necesa politika agado de la laborista klaso: «Konsiderante, ke kontraŭ la kolektiva regpovo de la posedantaj klasoj la proletaro povas agi kiel klaso nur mem konsistigante apartan politikan partion opoziciantan al ĉiuj malnovaj partioj formitaj de la posedantaj klasoj» - «La Konferenco rememorigas al la membroj de la Internacio, ke en la aktiva stato de la laborista klaso ĝia ekonomia movado kaj ĝia politika agado konsistigas neimageblan unuecon».

Kunvenintaj la 12-an de novembro 1871, la ĵurasaj sekcioj rifuzis submetiĝi al la «trudemaj» decidoj faritaj en Londono. En la sino de la Ĝeneva Ligo por la Socialista Demokratio la ĝenevaj gvidantoj estis favoraj al kunlaborado kun la burĝaj radikaluloj, dum la ĵurasaj detenis sin pri tio. La ĵurasaj sekcioj formis skisman federon favoran al Bakunino.

La disiĝo inter marksistoj kaj bakuninistoj konkretiĝis dum la kongreso en Hago okazinta de la 2.a ĝis la 7.a de septembro 1872. La ĵurasaj delegitoj petis pri «la abolo de la Ĝenerala Konsilio kaj pri la forigo de ĉia aŭtoritato en la Internacio», sed la kongresa plimulto konfirmis la aŭtoritaton de la Ĝenerala Konsilio

kaj eksigis Bakuninon. Laŭ propono prezentita de Markso kaj Engelso, la kongresa plimulto decidis transloki la Ĝeneralan Konsilion en Nov-Jorkon, sed la kontraŭtrudemuloj ne akceptis sian malsukceson.

La 15-an de septembro 1872, la reprezentantoj de 5 disiĝintaj federoj - ĵurasaj, itala, hispana, usona, franca - eksterordinare kongresis en la svisa urbo Sankta-Imiero (*Saint-Imier*). Ĉiuj federoj, kiuj daŭre funkciis en Eŭropo, rekuniĝis kun la disiĝintaj en la sino de la ILA. En la jaro 1873, en Ĝenevo la partoprenantoj en la 6-a ILA-kongreso unuanime voĉdonis por la abolo de la Ĝenerala Konsilio, adoptis novan statuton, kiu reliefigas la memstarecon de la sekcioj, kaj deklaris sian favoron al ĝenerala striko, por revolucie emancipi la proletaron.

Kongresoj de la ILA okazis en Bruselo kaj Berno, sed la organizaĵo iom post iom malfortiĝis. Bakunino forlasis ĝin en la jaro 1874. Pluraj ekzilitaj eksaj parizkomunumanoj, interalie Malono kaj Gedo (*Jules Guesde*, 1845 - 1922), faris la samon. Italoj rompis la rilatojn kun la ILA, por organizi lokajn ribelojn en la jaroj 1874 kaj 1876. En Nov-Jorko, la Ĝenerala Konsilio iom post iom malaktivis kaj ĝi malfondiĝis la 15-an de julio 1876 okaze de konferenco en Filadelfio (Pensilvanio). La lasta kongreso de la kontraŭtrudemacia Internacio okazis en Verviero (*Verviers*), Belgio, en septembro 1877, kaj la ĵurasaj federoj lastan fojon kongresis en oktobro 1880, en Ĉaudefono, Svisio.

De tiam tri diverĝaj vojoj prezentiĝis al la laboristaro de ĉiu lando: la korporacia laborsindikatismo, la social-demokratio, la anarkiismo.

Jean Selle

Resenda signo.

(*) Blankiistoj: adeptoj de la doktrino de la franca revoluciisto Blankio (*Louis Auguste Blanqui*, 1805 - 1881), kiu opoziciis al la burĝa kapitalista socio.

Rimarko.

La aŭtoro de la artikolo provis esperantigi ĉiujn proprajn nomojn, kio fariĝas necesa, kiam temas pri historio aŭ geografio; kelkaj el ili troviĝas en la PIV.

Nota.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la 6-a ĉapitro de la 1-a volumo de la libro titolita *Histoire du socialisme*, verkita de kolektivo da fakuloj, eldonita de la firmao *Presses Universitaires de France* en la jaro 1979.



ĈU AL MONDA MONO?

Philippe Derudder, ekonomiisto



Okaze de la Bretton Woods interkonsentoj, jam estis proponita de John Meynard Keynes, nome de Anglio, la ideo pri monda mono, la «bankoro». Sed, finfine estis elektita la Usona propono de Harry Dexter White. Tiel, la Usona dolaro iĝis la mono por rezervo kaj internaciaj interŝanĝoj, ĉar tiutempe Usono posedis 70 % el la monda or-stoko. Tiam, la mon-sistemo ankoraŭ apogis sin sur oro. Sed, ĉar tiu-ĉi troviĝis ĉe «Onklo Sam», nur la dolaro prezentis «fidindan valoron». Oni ne forgesu ke unu el la tradiciaj funkcioj de mono estas valoraj-rezervo. Tio supozigas ke, kiam oni ŝparas monon, oni esperas ke ĝi havos almenaŭ saman aĉet-povon en la momento kiam oni uzos ĝin, eĉ jarojn poste. La usona dolaro donis tian sekurecon.

La konvertebleco de la dolaro estis forlasita en 1971, pro tio ke la tuta oro de Usono estis elirinta el Fort Knox, dum la 30 «gloraj jaroj» (1). Tial, la lando troviĝis en malbona situacio kiam pluraj nacioj, kiel aparte Francio, petis ke iliaj dolaroj estu tuj konvertotaj al oro. Por iu ajn alia lando, tiu decido estigus fid-perdon je ĝia mono. Sed por Usono, la privilegia statuso de internacia devizo ebligis ke dolaro iĝis «as good as gold» (tiom bona kiom oro). Mirinda atuto! Ĉu vi konscias? Ne plu necesas materia (konkreta) etalono; dolaro valoras per si-mem, nur pro sia specifeco. Tiel do, ekde 1971, oni taksas la devizojn unu kompare kun aliaj en la deviz-merkato. Se iu mono estas multe aĉetata, ĝia valoro pli-altiĝas; se ĝi estas grand-kvante vend-proponata, ĝia valoro malpli-altiĝas.

Sendube, Dolaro spertis gravajn variadojn (fluktadojn), sed la investantoj neniam perdis fidon je ĝi. Denove rimarkindas ke ĝia statuso de internacia devizo igas ĝin ĉie necesa, ĉefe ĉar oni negocas pri nafto per dolaro, same kiel pri plimulto de la internaciaj komercaj interŝanĝoj. Do, ĉiuj volas posedi dolaran monon, kiun oni akiras ĉu per vendo de produktaj eksterlanden, ĉu per aĉeto en la deviz-merkato.

Usono, nur bezonas emisii ĝin... Jen ĝuste la problemo kiun neniu preter-atentis sed pri kiu ĉiuj hipokrite fermis kaj daŭre fermas la okulojn. Jes, sed ĝis ia grado... ĉar la usona komerca bilanco iĝis ege deficitica pro tio ke Usono fordonis al Ĉinio la produktadon de ordinaraj konsumeblaĵoj, kaj ĉar la ŝtato, dum la regado de Bush, daŭre pligravigis la buĝetan malprofiton, ĉefe por financi sian kampanjon kontraŭ terorismo. Tiel, la usona ŝuldo supren-flugis al pintoj ĝis nun neniam atingitaj: la bagatelo de preskaŭ 50 000 miliardoj se oni enkalkulas la ŝuldojn de la entreprenoj, de la familioj, de la financa sektoro, kaj

de la ŝtato.

Kiel tio eblas? Tutsimple ĉar la cetero de la mondo daŭre konsentas aĉeti dolarojn aŭ usonajn trezor-kuponojn. Fakte, la usona mono estas nun absolute senvalora sed ĉiuj estas lig-kaptitaj en ludo, kie ĉiu tenas la alian kaj reciproke ĉar se oni ekbojkotus la dolaron, ĝi tuj disfalus. Se ĝi disfalus, la ŝparmono de la tuta mondo forvaporigus pro tio ke la ŝtataj havaĵoj (rezervoj) konsistas plejparte el dolaroj. Ĉu Ĉinio ŝatus perdi siajn 1300 miliardojn? Kaj Sauda Arabio? Kaj Japanio? Kaj Eŭropo?

Tiam, aldoniĝas la hipoteka krizo, la bankroto de la banksistemo, ĝia provo saviĝi per lavango de centoj da miliardoj. Tiuj-ĉi miliardoj, kompreneble, estas depruntitaj (kaj ni jam scias ke la krom-injektoj ne estos homeopatiecaj). Kaj necesas antaŭvidi pliajn elspezojn por eviti la tutan ruiniĝon de la ekonomisistemo... Jen en kiu kaŭzo troviĝas la mondo: ŝtatoj superŝutataj de ŝuldoj, ŝanceliĝantaj ekonomioj, mon-sistemo interne korodita kaj referenca mon-unuo tute senvalora.

La demandon pri reviziado de la mon-sistemo, oni ne plu ignoru. Ĝi estos la ĉefa diskut-temo baldaŭ en Londono (G20-kunveno, marto 2009). Kio rezultos el tio? Tre inteligenta estas tiu kiu povus antaŭdiri, tamen, la ideo pri referenca mond-mono anstataŭ la usona dolaro pluiras sian vojon. La ideo pri monda-mono kiu estiĝus laŭ la eŭro-modelo, surbaze de aro da signifaj devizoj, allogas ĉar ŝajnas prudente forlasi referencan devizon kiu pludaŭras nur arbitre. Sed sendube, la afero estos ja malfacila ĉar ĝi implicas ke Usono rezignu pri atuto kiu grand-parte kontribuis al ĝia hegemonio super la mondo.

Do, ni ne klopodu prognozi pri kio okazos aŭ ne (en Londono), sed provu scii tion kio estas dezirinda. Ni ne forgesu ke mono estas nur ilo. Ĉu monda, ĉu ne, ĝi nur povos respiguli la modelon (paradigmon) kiu subtenas ĝin. Do, ĉio dependos de kiamaniere ni elpensos (pripensos) la organizadon de la mondo kaj tiam ni turnos nin ĉu al mono de la «fermita pugno», ĉu al mono de la «malfermita mano».

La «fermita pugno», tio estas kuntiriĝo super akiraĵoj, volo konservi la nunajn reg-povojn, rifuzo konsideri ke la liberal-kapitalisma ideologio respondecas pri la «malsanoj» de la mondo kaj ne taŭgas por alfronti la defiojn de nia epoko. Ĉio tio kondukus al privata plu-regado de la mono far kartelo de privataj bankoj. Kompreneble, oni blufe enkondukos kelkajn kontrolojn, tien kaj tien ĉi kaj elvokos pli da travidebleco sed kiam la aŭtoritatoj estas juĝantoj kaj juĝatoj en

tiu mondo regata de financa profito kaj strebado al prioritata plenumo de privataj interesoj, tiam oni verŝajne nur retropaŝos antaŭ la granda salto.

Sed la mispaŝo estas pordo malfermita al totalismo: privata mono en kunteksto de tutmonda ekonomia krizo kun, aldone, rezultoj de ekologia krizo, facile povas konduki al iompostioma starigo de totalisma sistemo, pravigita de la escepta situacio kaŭzita de tiuj krizoj. Kiam mankas la konscio, «fermita pugno» prem-falanta iĝas facila solvo. Sufiĉas vidi kiamaniere la flamo de la liberec-statuo rapide transformiĝis al klabo dum la Bush-administrado, nome de batalo kontraŭ terorismo! «Donu al mi bonan kialon kaj mi tuj senigos vin je ĉiuj individuaj rajtoj». Ĉu fikcio-politiko? Vidante la ludon ludatan en la mondo dum la du lastaj jardekoj, estas pli ĝuste paroli pri «reality show»! Popoloj kvazaŭ rimem-tenataj helpe de totalisma sistemo «pravigita»... kaj regado super la mono kiu ebligas decidi kiu posedos kaj kiu ne, jen metodo simpla kaj efika, ĉu ne?

La «malfermita mano», tio estas kompreni ke neniu homo, eĉ riĉega, eĉ socie potencega, povas feliĉi kaj simple supervivi, se ni ne respektas la vivon kaj se ni ne enkalkulas unue la komunan bonon (bonfarton) ne nur je nacia sed ankaŭ je planeda nivelo. La malfermita mano, tio estas konsideri ke ĉiuj homoj senescepte rajtas dignan kaj feliĉigan vivon, kaj utiligi ĉiujn rimedojn por rapide atingi tiun celon. La malfermita mano, tio estas respekto al nia sola riĉaĵo: la Vivo sur nia tre malgranda planedo, nia «kultivenda ĝardeno». La malfermita mano, tio estas meti la monon je la servo de plibonigo de la vivkvalito por ĉiuj. Tiel konceptita, monda mono povus esti beno. Je kiuj kondiĉoj?

La monda mono estus publika kaj ne privata, emisiata kaj mastrumata de organizo ligita al, ekzemple U.N.O., organizo en kiu ĉiuj Nacioj estus demokrate reprezentataj sen veto-raĵto. Por pli da klareco, ni nomos ĝin «Monda Banko» (ne referencante, kompreneble, al tiu kiu tiel nomiĝas nun).

La monda mono ne cirkulus. Ĝi estus nur referenc-mono ekskluzive interŝanĝebla inter la Monda Banko kaj la centraj bankoj de la diversaj landoj kaj mon-zonoj. Aldire, ĉiu lando plu uzus sian propran monon kiu havus konstantan kurzon rilate al la monda mono, kurzo decidebla kaj modifebla ekskluzive de la Monda Banko.

La Monda Banko havus du funkciojn:

- Ĝi estus la sola uzebla por la internaciaj interŝanĝoj. Internacie, la prezoj ĉiam estus difinitaj en monda mono, sed la agantoj en la ekonomia sfero, inkluzive de la ŝtatoj, estus debetataj aŭ kreditataj naci-mone laŭ la tiama kurzo.

- Ĝi estus ilo por financadi la naciajn kaj internaciajn projektojn (planojn) por ĉies profito. Por tion fari, oni povus emisii ĝin «ex nihilo» (el nenio), sen neceso pruntepreni kaj seninterese. Tiel oni povus komenci kaj rapide plenumi la plej ambiciajn projektojn:

1°) Por helpi ĉiun nacion atingi la kiel eble plej altan aŭtonomecon en ĉiuj kampoj,

2°) Por transformi la metodojn de agrokultura kaj industria produktado, de transportoj, loĝado, energio, por akordi ilin kun ekologiaj postuloj,

3°) Por mon-helpi la sciencajn esplorojn,

4°) Ankaŭ por financi la esceptajn internaciajn sanitarajn agadojn.

Krom la sanitaraj agadoj kiuj postulas tujan intervenon, la aliaj projektoj je kolektiva intereso devus unue esti demokrate akceptitaj en la koncernaj landoj kaj poste aprobitaj de internacia komisiono kies tasko estus kontrolado de ekologia kosto kaj kongrueco de

la projekto kun la ĉefaj elektoj de la monda politiko rilate al plibonigado de la viv-kvalito. Post aprobo, la kapitalo en monda mono estus disponigata en la centraj bankoj de la koncernataj landoj kaj la agantoj estus pagataj per nacia mono kreita laŭ la tiama kurzo. Krom esceptoj, por pli bone spur-sekvi la kapitalon kaj eviti ĉian misuzadon (fraŭdon), oni ne konfidus la monon al la profitontaj ŝtatoj.

Krom havigi al ni, mondnivele, financan ilon kiu ebligus akcepti la nuntempajn defiojn – eblecoj limigitaj de niaj sciencoj, teknologioj kaj hom-rimedoj – tiu simpla sistemo ebligus:

1°) Respondi al la urĝaj problemoj sanitaraj, sociaj kaj ekologiaj,

2°) Doni al ĉiu enspezigan kaj senc-havan postenon efektive forigante malriĉ(ec)on kaj detruajn kromefikojn de senlaboreco, marĝeneco kaj ekskluziveco,

3°) Igi ne-ebla mon-spekuladon, 4°) Flankenlasi la fiskajn paradizojn, devigante ke internaciaj interŝanĝoj okazu tra-banke kaj mond-mone, ekskludante la bankojn sidantajn en fiskaj paradizoj,

5°) Liberigi la ekonomion kaj ĝiajn agantojn disde la devigo kreskadi.

Efektive, ne plu necesus amasigi rezervojn por protekti sin aŭ por finansian socian evaluadon (disvolviĝon) ĉar eblus trovi la financojn ĉe la Monda Banko, sen ŝuldiĝi nek starigi kromajn impostojn.

Tio estas nur kelkaj gvid-linioj evidente ne-sufiĉaj. Sed la celo, ĉi tie, estis emfazi la gravan rolon de monda mono kiel taŭga ilo se ĝin akompanus politiko de la malfermita mano. Se ni, la civitanoj, tion volas kaj sciigas, tiam la ideo iam enkorpiĝos ĉar neniu potenco rezistas longtempe kontraŭ la volo de la popoloj.

Tradukita de la lernantoj (2a-gradaj) de Elizabeth Barbay, kun la permeso de la aŭtoro, kaj rete eldonita ĉe:

Internacia Asocio por Subteno al Sociumaj Ekonomi-sistemoj Ekonomio kaj mono estu je la servo de Homo kaj Tero
www.aises-fr.org/citoyen.html

(1) «30 Gloraj jaroj»: la jaroj post la 2a mond-milito

Leginda Legendo Flugo de cigno legendo el la kelta mitologio.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el kvar kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj pri eroj el la prezentitaj tekstoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Oengus estis la plej juna dio. Li naskiĝis¹, kiam homoj ekmalinteresiĝis² pri Dagda, lia patro. Do Dagda estis maljuna³ dum Oengus estis forta, bela kaj ĝoja. Iam, la juna dio ekvidis⁴ belegan⁵ virinon⁶. Vestita⁷ per blanka robo, ŝi ridetis⁸. Ŝiaj gestoj estis graciaj. Ŝi havis nigran hararon⁹ kaj ruĝajn lipojn. Oengus, ĉarmita¹⁰ de la virino, volis tuŝi ŝin. Li ne estis timida, ĉar li sciis, ke li estas pli bela ol la aliaj viroj. La dio havis blondan hararon kaj luman rigardon. Sed, kiam li proksimiĝis¹¹

sian manon al la virino, ŝi malaperis¹². Oengus vek-iĝis¹³. Estis nur sonĝo! Sed obseda sonĝo. La belega dio iom post iom iĝis sklavo de la mistera virino, kiu vizitis lin ĉiunokte en liaj sonĝoj. Oengus ekmalgajiĝis¹⁴. Lia patrino, la diino Boann, malsereniĝis pri li. Ŝi petis de la kuracisto¹⁵ de la dioj, Diancecht, kaj de la druido Fingol kuraci ŝian filon. Sed ili respondis, ke ili ne povas fari ion por li, ĉar Oengus amas belan misteran virinon. Do Boann decidis trovi ŝin. La diino rondiris tra¹⁶ Irlando

dum unu jaro, sed ŝi ne trovis ŝin. Tiam ŝi petis de sia edzo trovi la belulinon. Dum unu jaro, Dagda iris tra Insulo de la Fortuloj kaj Gaŭlio, sed ankaŭ li ne sukcesis trovi ŝin. Tiam la gedioj¹⁷ vizitis Bobd-on, la reĝon de la tumulo de Munster, por peti, ke li trovi ŝin. Post unu jaro, Bobd diris: «La mistera belulino nomiĝas Caer Ibormait. Ŝi estas la filino de Ethal, reĝo de la tumulo de Uaman». Dagda kaj lia edzino elpetis¹⁸ Caer-on de la reĝo Ethal. Sed li ne konsentis: «Mia filino estas homo dum unu jaro, kaj dum la posta jaro ŝi estas cigno naĝanta sur la lago Bel Dracon». Tuj, Oengus iris ĉe la lagon. Estis cent kvindek cignoj kaj li ne povis rekoni sian belulinon. Subite, la brakoj de Oengus iĝis flugiloj kaj plumoj ekkovris lian korpon. Nun, li estis cigno kaj li povis rekoni sian karan cigninon.

Cecilia

1	nask-iĝ-is	naquit
2	ek-mal-interes-iĝ-is	commencèrent à se désintéresser
3	mal-jun-a	vieux
4	ek-vid-is	aperçut
5	bel-eg-a-n	magnifique (accusatif)
6	vir-in-o-n	femme (acc.)
7	vest-it-a	vêtue
8	rid-et-is	souriait
9	har-ar-o-n	cheveux (acc)

10	ĉarm-it-a	charmé
11	proksim-ig-is	(r)approcha
12	mal-aper-is	disparut
13	vek-iĝ-is	se réveilla
14	ek-mal-gaj-iĝ-is	commença à s'attrister
15	kurac-ist-o	médecin
16	rond-ir-is tra	parcourir
17	ge-di-o-j	les dieux (des deux sexes)
18	el-pet-is	firent mander

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Concours: un logo pour SAT-Amikaro

Comme vous l'aurez sans doute constaté, notre association ne dispose pas encore de logo officiel. Ce dernier permettrait d'identifier de manière unique et immédiate notre association sur divers supports (bulletins d'adhésion, feuilles indiquant des cours d'espéranto, livres édités par SAT-Amikaro, tracts, etc.) ainsi que lors des manifestations.

Pour cette raison, le Comité organise un concours pour donner un logo à SAT-Amikaro. Envoyez vos propositions à sat-amikaro@wanadoo.fr, elles seront publiées tous les mois dans La Sago ainsi que sur le site Internet de l'association (www.esperanto-sat.info). Le concours est ouvert à tous, membres de l'association ou non.

Un débat aura lieu dans les colonnes de La Sago concernant les propositions retenues par le Comité. Le choix du logo s'effectuera par vote lors du prochain congrès de l'association (Pâques 2010).

Quelles sont les recommandations pour faire un logo facilement exploitable?

Le logo final doit pouvoir être vectorisé (svg, ai) sans inclusion de bitmap.

Il doit être déclinable en 4 variantes:

- Version quadrichromie (par exemple pour internet/plaquettes imprimeur);
- Version 2 couleurs (par exemple pour imprimeur 2 couleurs ou serigraphie textile, etc.);
- Version niveaux de gris (photocopies);
- Version 1 couleur (sérigraphie).

Il faut favoriser les projets avec des traits et des aplats, sans dégradés ni effets de nuances etc. qui passent mal dans certains types d'impression et rendent les versions 1 couleur et 2 couleurs indispensables.

Le logo doit être déclinable en version avec ou sans «signature». Il est donc nécessaire de définir la «signature» de SAT-Amikaro. Le choix de cette dernière peut être indépendant de l'image choisie pour le logo. Il est donc possible de les choisir séparément et d'adapter ensuite la «signature» au logo.

Il faut que le mot «Espéranto» apparaisse, ainsi qu'une mention indiquant qu'il s'agit d'une langue (comme par exemple: «Langue de Solidarité Internationale»). Il est également possible d'utiliser le slogan: «Espéranto: vers une culture sociale sans frontières», actuellement utilisé pour La Sago. Le choix de la signature comporte non seulement un choix de texte mais aussi le choix de la police sous lequel il apparaîtra.

Si vous n'avez pas les compétences informatiques pour satisfaire toutes les recommandations:

Dans ce cas, il vous est possible d'envoyer votre proposition faite selon vos compétences par courriel à sat-amikaro@wanadoo.fr ou par courrier postal au siège de l'association. Elle y sera traitée par des camarades compétents.

Le Comité de SAT-Amikaro avec l'aide de Frédéric Scibor

Défense des langues = nationalisme linguistique (troisième et dernière partie)

Zamenhof: un précurseur de l'anationalisme

Zamenhof a eu une attitude prudente à l'égard du nationalisme; dans son projet sur l'humanitarisme, il a proclamé le principe du «caractère apatride de la terre» (c'est à dire le refus de toute prétention territoriale sur une base ethnique). Il n'était pas un nationaliste linguistique et il a même qualifié de «chauvins nationaux» ceux qui considéraient comme un malheur la disparition des langues nationales. Il estimait que les éléments lexicaux communs à plusieurs langues constituaient une circonstance favorable pour la création de la Langue Internationale, disant: «... je remarquai bientôt que les langues actuelles possédaient une immense réserve de mots tout prêts, déjà internationaux, connus par tous les peuples et constituant un vocabulaire précieux pour une future langue interna-

tionale; j'ai donc évidemment utilisé ce trésor.» Il est peu probable que Zamenhof, en esprit éclairé passionné de langues, n'ait pas entendu parler de purisme linguistique d'inspiration politique, mais il n'a jamais proposé de symbiose entre ce courant et l'espérantisme. Il a considéré, avec raison, que l'emprunt lexical entre langues était une circonstance qui facilitait la communication internationale et l'évolution de la langue internationale.

L'Espéranto ne «sauvera» pas les autres langues

Des éléments de l'Espéranto sont capables de pénétrer profondément dans les langues ethniques, tout autant que des éléments de l'anglais. Nous disposons pour cela d'expériences. Qui n'a jamais entendu des espérantistes parlant entre eux en langue nationale et lançant des

expressions typiques de l'Espéranto et de son mouvement? Il est difficile de prévoir la similitude de ce phénomène avec l'assimilation par les langues nationales d'expressions anglaises spécialisées ou propres à un groupe que l'on peut observer dans certains milieux professionnels, parmi les adeptes de sous-cultures pour jeunes etc. L'argument selon lequel l'Espéranto, parce que neutre, n'est pas en capacité de «mettre en danger» les autres langues, est naïf et loin de la réalité.

Personne ne peut prédire avec certitude les effets macrosociaux qu'aurait la «victoire finale» de l'Espéranto. Ne peut-on pas au moins émettre l'hypothèse que la généralisation d'une langue internationale facile à apprendre accélérerait les échanges culturels de toutes sortes et hâterait le processus de convergence culturelle mondiale qui est de toute fa-

çon inéluctable? En quoi le caractère «neutre» de l'Espéranto le mettrait-il dans l'incapacité de remplacer, même totalement, les autres langues, là où les circonstances y seraient favorables?

La réputation de l'Espéranto y gagnerait, si ses utilisateurs s'abstenaient de tout fantasme linguo-sociologique sur le fait qu'il serait capable de «sauver» les autres langues soit de leur «pollution» par des éléments lexicaux exogènes, soit de leur disparition. Elle y gagnerait encore plus, si les espérantistes s'intéressaient suffisamment à la «diversité culturelle» toujours vantée pour remarquer qu'elle ne présente pas qu'une face ethnologique, au lieu de faire entendre sans cesse un refrain défraîchi repris aux ethno-pluralistes de la nouvelle droite.

De la «paix» à la «diversité culturelle»

Effectivement, il s'est produit au cours des années 70 et 80 une «révolution copernicienne» dans le mouvement espérantiste: celui-ci a radicalement modifié la perception qu'il avait de lui-même. Le leitmotiv «paix» a cédé la place à «diversité culturelle». On peut remarquer que le lien idéologique entre l'Espéranto et la paix devenait problématique précisément parce que les précédentes générations de doux rêveurs l'avaient trop ressassé en répandant leurs visions risquées et incroyables au sujet d'une pacification du monde qui serait réalisée principalement grâce à l'Espéranto.

Pendant une courte période, il y a quelques décennies, la théorie prétendument de gauche selon laquelle l'Espéranto sauverait les petits peuples et les langues ethniques menacés par l'«impérialisme culturel» s'est emparé des têtes et des coeurs, surtout chez les jeunes espérantistes. Mais de telles idées commencent maintenant à rencontrer de plus en plus de scepticisme, parce que l'influence sociale des nationalismes «de gauche» est en recul. Imaginer qu'elles disparaîtraient spontanément serait cependant trop optimiste. Il est nécessaire de faire preuve de patience dans la critique.

Le nationalisme linguistique: petit espoir ou piège?

Combien d'adeptes de la victoire finale croient que l'Espéranto doit vaincre maintenant, car sinon il ne vaincra jamais? Cela explique-t-il qu'ils s'accrochent au minuscule brin d'espoir apporté par le nationalisme linguistique? Force est de constater que le nationalisme linguistique donne de faux espoirs. A supposer que, dans l'avenir, l'Espéranto serve de modèle à des relations linguistiques plus équitables (ou bien

même qu'il obtienne la «victoire finale»), cela ne pourra se faire que dans le contexte d'un ordre social radicalement égalitaire, ce qui n'est pas le cas maintenant. En attendant, la communauté des espérantophones risque bien de perdre sa crédibilité dans des aventures idéologiques.

Texte original en espéranto de Gary Mickle, traduit par JoLoCo.

Réaction :

C'est un article fort ambigu que, sous la signature de Gary Mickel, publie *La Sago* de juin. On y apprend (c'est le titre) que «défense des langues = nationalisme linguistique». Il y est exposé que les espérantistes qui voient une corrélation entre leur action et la défense des langues vivantes (menacées, toutes menacées par l'anglais) sont des «nationalistes» linguistiques, victimes d'une «idéologie à la mode», laquelle, comme tout nationalisme, flirte avec l'extrême-droite - et des noms sont fournis d'espérantistes d'extrême-droite. Or, l'extrême-droite, c'est bien connu, utilise la langue comme marqueur de l'ethnie, et mélange ethnie et race. Et voici les espérantistes visés rangés directement sous la bannière des racistes!

Or, la défense des langues, c'est avant tout la défense de la richesse, de la diversité et de la pluralité humaines. Et être favorable à l'espéranto, c'est entre autres pour éviter qu'une langue s'appuyant sur de colossales puissances économiques, politiques et militaires s'étende au reste de la planète et l'uniformise linguistiquement. L'espéranto ne menace rien ni personne, et l'on n'imagine assurément pas un pays adoptant l'espéranto comme langue nationale à la place de la sienne.

Il y a donc une corrélation étroite entre défendre sa propre langue et être espérantiste. Je le suis, et suis membre d'Avenir de la Langue Française - dont les membres ne sont certes pas en majorité de droite.

Défendre le français n'est assurément pas nationaliste: Avenir de la Langue Française et d'autres organisations de défenseurs de la langue française ayant créé le Prix de la carpette anglaise pour «récompenser» les fanatiques de l'anglais en France, ils ont tout récemment aidé des homologues italiens à créer un prix équivalent dans leur pays. Défendre le français est donc défendre aussi l'italien - et toutes les autres langues. Si l'on rappelle par ailleurs que de grands linguistes ont été favorables à l'espéranto (Antoine Meillet et Edward Sapir avant guerre, une Henriette Walter aujourd'hui), c'est

bien évidemment parce que la diversité linguistique est essentielle à leurs yeux, et adopter l'espéranto dans la communication internationale serait la garantie que le navaho, les langues sioux et bantou, le vepse et le zyriène, le sérère et le peul, les dialectes d'Asie du sud-est, de Micronésie ou de Mélanésie, les deux mille langues de Papouasie, ne seraient pas condamnés à la disparition.

L'article porte un doigt accusateur contre des personnes qui s'inquiètent de l'abondance des emprunts anglais dans les langues vivantes contemporaines. Cette question des emprunts doit être étudiée, soupesée, et ne peut faire l'objet d'un jugement *a priori*. Deux exemples: au XVIe siècle, le français a adopté un nombre considérable de mots italiens; lorsqu'on fait le bilan de ces emprunts quatre siècles plus tard, on s'aperçoit qu'environ la moitié des emprunts faits à l'italien à l'époque se sont maintenus; ils n'ont finalement servi qu'à enrichir la langue française. Fort bien. Maintenant, ces résultats sont-ils transposables dans le monde actuel? Pouvons-vous nous dire que le français peut engranger autant de mots anglais qu'il veut, et que, plus tard, un tri se fera spontanément dans la langue? Hélas, les conditions ont fantastiquement changé, et le problème est de se demander s'il y aura un «plus tard» - dans quatre siècles, existera-t-il encore un français, où l'on pourrait étudier le pourcentage de mots anglais qu'il contiendrait? En fait, les dangers sont infiniment plus grands qu'au XVIe siècle, et c'est pour quoi - c'est mon deuxième exemple - aujourd'hui l'Etat du Québec paye un organisme, composé de linguistes, dont l'unique rôle est de produire journalièrement des traductions des néologismes anglais. Parce qu'ils voient bien que sans cet effort, le français québécois se saturera de mots anglais, et un jour sera emporté, la population découvrant qu'elle a intérêt à passer purement et simplement à cette dernière langue. Les deux exemples que je donne sont donc contradictoires: acceptation totale dans le français au XVIe siècle, exclusion de l'emprunt dans le québécois contemporain. C'est pourquoi, je le répète, on doit se passer de tout jugement *a priori*, et de taxer de «nationaliste linguistique» une personne qui s'inquiète des emprunts anglais dans sa propre langue.

Enfin, faire état des espérantistes d'extrême-droite, fort peu nombreux au demeurant, c'est paradoxal dans un mouvement qui, par définition, n'entend pas vouer son destin à un courant politique particulier. Heureusement qu'il y a des espérantistes d'extrême-droite: le contraire serait inquiétant.

Bernard Sergent

...ça bouge partout...

■ **Les Euronautes** - 19 juin 2009
- Interview de Vincent Cespedes

Le site **Les Euronautes** publie le 19 juin, jour de l'épreuve de philosophie du baccalauréat, une interview de Vincent Cespedes intitulée «L'Europe doit se faire dans les corps, dans les chairs, dans les familles et dans les désirs», au cours de laquelle le philosophe fait allusion à l'Espéranto, envisagé comme langue commune européenne :



[...] Et puis, créer l'Europe c'est créer des ponts et des passerelles. Mais je parle vraiment de choses humaines, je ne parle pas simplement de ponts financiers et de frontières douanières qui se lèvent. Apprendre aussi l'histoire de l'Europe, c'est apprendre pendant quatre mois la Suède et un peu de Suédois, la Norvège et un peu de norvégien, apprendre l'histoire des pays européens et favoriser l'échange.

Avec Internet c'est possible, avec la réflexion d'une langue commune européenne, qui serait autre que l'anglais, qui serait une langue inventée, créée, ou l'Espéranto, qui fonctionne très bien. Il faut des politiques audacieuses, il faut des propositions, et il faut surtout du voyage. C'est en voyageant et en rencontrant physiquement l'autre, que l'on peut créer l'autre européen, que l'on peut créer un sentiment de filiation.

Il suffit que dans une famille, un garçon soit amoureux d'une fille et que le garçon soit italien et que la fille soit suédoise pour que tout d'un coup l'Europe se fasse, non plus seulement sur des traités, des planifications et de l'administratif, mais dans les corps, dans les chairs, dans les familles et dans les désirs.

Source (avec le texte intégral de l'interview) : <http://www.leseuronautes.eu/connaître-l-europe/actualite/vincent-cespedes-leurope-doit-se-faire-dans-les-corps-dans-les-chairs-d>

Voir aussi : <http://info.france2.fr/elections/europeennes-2009/interviews/54818259-fr.php>

En savoir plus sur Vincent Cespedes : <http://www.vincentcespedes.net/fr/index.php>

■ Dans **les Dernières Nouvelles d'Alsace** du 9 juillet paraît un article intitulé Fin d'année scolaire sur la fête de fin d'année de l'association Mulhouse Espéranto.

<http://www.dna.fr/articles/200907/09/fin-annee-scolaire,mulhouse,000004608.php>

Le site de Mulhouse Espéranto :

<http://mulhouse.esperanto.free.fr/index.htm>

■ **La Voix du Nord** du 9 juillet publie dans la rubrique Actualité Montreuil (Pas-de-Calais) un article intitulé La vie de Van Gogh en espéranto.

■ **Les Infostratèges** publie le 08 juillet un article sur Ekopedia, une encyclopédie dédiée à l'écologie dans lequel il est précisé que «Ekopedia est disponible en 7 langues : français, allemand, anglais, espagnol, italien, polonais et espéranto.»



■ **La Nouvelle Union** du 12 juillet publie dans un article intitulé Une grande première dans les rues de Ham-Nord une mention de l'espéranto en tant que langue dans laquelle est diffusé un hymne dans une manifestation écologique.



■ **7sur7** publie le 13 juillet un article intitulé 12.000 festivaliers pour LaSemo, compte rendu de ce «seul festival durable de grande ampleur en Communauté Française, LaSemo («La Graine», en Esperanto) [qui] entend montrer qu'il est possible de respecter l'environnement tout en s'amusant.»



Cours dans l'Est

Nilvange (57)

Cours de langue internationale:

Qu'est-ce que l'espéranto ? Une langue imaginaire ou un vieux patois régional ? Ni l'un ni l'autre: L'espéranto est une langue internationale, qui initiée il y a plus de 120 ans ne cesse de se développer par son vocabulaire et sa littérature et dont le nombre de locuteurs ne cesse d'augmenter. Sa diffusion touche maintenant tous les continents. La connaissance de l'espéranto ouvre donc les portes de la plupart des pays du monde. Mieux encore: cette langue peut s'apprendre ici, dans la vallée de la Fensch et s'y pratiquer car des espérantophones de tous pays viennent visiter la vallée. L'apprentissage de l'espéranto exige huit fois à dix fois moins de temps que celui de l'anglais ou de l'allemand. Même ses qualités propédeutiques permettent d'apprendre plus facilement les autres langues car l'on y trouve des racines des principales langues européennes mais avec une grammaire plus simple.



Une première leçon d'essai aura lieu le 16/09/2009 de 20H00 à 21H30 au Centre Socioculturel Albert Camus de Nilvange puis les 1er et 3ème mercredis de chaque mois. Un stage aura lieu aussi au printemps au Centre Socioculturel Albert Camus Nilvange avec un programme culturel riche et varié.

Renseignements:
03 82 53 25 47 et 03 87 73 95 57
esperanto-thionville@laposte.net
<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

Le Tholy (88)

contact : Robert Colin, 03 29 61 83 27

Mulhouse (68)

Mulhouse Espéranto :
<http://mulhouse.esperanto.free.fr/>
COURS D'ESPERANTO
à l'espace110 A ILLZACH :

- Cours pour débutants les mercredis soir de 18h30 à 20h

- Cours pour avancés les jeudis soir de 18h30 à 20h

Contact: mulhouse.esperanto7@free.fr
Par correspondance : Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR
Tél. 03 89 77 52 56

BD, SF et espéranto....

«ESPERANTO»

la BD d'Otto Gabos

Présentation de l'éditeur :

Nous sommes dans l'une des innombrables dimensions de l'espace-temps, ici ou ailleurs... Nous sommes dans la capitale d'un état qui ne s'est pas encore remis de la guerre - désastreusement perdue - avec le « Pays d'à côté ». Une guerre voulue, mais dont le résultat est un territoire qui ressemble à du gruyère et des hommes à l'esprit fragile. Les gens courent partout, pour fuir leurs angoisses, pour nier leurs problèmes. Dans cette capitale, qui est un croisement entre Calcutta et Manhattan, tout le monde bouge, et bouge vite. La religion n'est ici qu'un lointain souvenir, dans cet état laïque le seul principe qui ressemble à une divinité est le hasard, sous la forme d'un jeu, la loterie nationale, dont les chiffres sont tirés au Palais des Jeux. La langue commune est l'espéranto ! Après la guerre, la loi a interdit toute agressivité directe, remplacée et sublimée par les jeux, des jeux de rôle. Isidore Bemporad arrive enfin au siège de l'une des plus importantes compagnies productrices de jeux de rôle, la Ludo Fantasta. Cet homme qui a l'air d'un modeste employé accède enfin au bureau du directeur et propose son idée, persuadé que son jeu aura un succès incroyable : Un jeu, intitulé "La Deuxième Guerre Mondiale".



- Parution : 22/10/2008
- Collection : KSTR
- Serie : KSTR
- 144 p. 19 x 28 cm
- ISBN : 9782203003835
- EAN : 9782203003835

La Guerre des Mondes, BD en espéranto

A la fin du 19e siècle, des Marsiens abominables attaquent la Terre et l'Humanité. Les étrangers veulent faire disparaître tout et tout le monde et conquérir la Terre pour eux seuls. Après d'âpres batailles, alors qu'il semble que la race humaine est vaincue et va disparaître du théâtre de la vie, arrive une aide inattendue. Les Marsiens sont infectés et décimés par les bactéries terrestres.

Le roman original a été écrit par H. G. Wells, et sa version radio-théâtre a même semé la panique aux États-Unis lors de sa diffusion le 30 octobre 1938.

Cette œuvre est maintenant disponible sous forme de bande dessinée avec les textes en Espéranto sur le tout nouveau site : <http://www.fenestro.extra.hu>

Lien direct vers la bande dessinée : <http://www.fenestro.extra.hu/pagoj/Bildstrio/Milito/LaMilitodelaMondo/index.html>

Source : Ret-Info (<http://www.eventoj.hu>)



Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Judi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Renseignements utiles

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhard
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 04 76 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: libroservo@sat-amikaro.org

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : (idem ci dessus provisoirement)
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@aliceadsl.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.

- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à : Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépôt légal à parution.

LA SAGO -Août-Septembre 2009.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Vidpunkto de CNT-ano

Reage al

«kontribuo al Vikipedio»: «Revolucia sindikatismo»,

tradukita de Phil Guichet, Maksimiliano Gverino kaj Vinko Markov

....Mi deziras alporti kelkajn precizigojn pri tiu artikolo koncerne la CNT-on kiu ekzistis inter la du Mondmilitoj, ĉar ne estis sindikato, en Francio, sub tiu nomo. Jose Peirats, anarkista verkisto skribis en sia libro «Les anarchistes Espagnols», ke en Hispanio (1910) «Solidaridad Obrera» (Laborista solidareco), dum la kongreso de Barcelono elpensis la «Nacian Konfederacion de la Laboro (CNT)» kiel ilo de lukto.

Malprave, la artikolo adaptita de niaj kamaradoj citis pri revolucia sindikatismo «ĉi tiu speco de sindikatismo nur marĝena ankaŭ ekzistas en Francio per la franca CNT».

En broŝuro «Revolucia kaj Anarkista sindikatismo» (Syndicalisme et Anarcho-Syndicalisme), mi tion legas: «en 1926, unu tendenco fondos la CGT/SR, ĉefe vigligita de Pierre Besnard.»

Ne temis pri nur esti eksterpartia, sed principe konscio pri «sindikatismo de batalo» kontraŭ la avangardismo rekomendita de politikaj partioj,

reformistoj, aŭ laŭdire revoluciuloj.

La CGT/SR rolos por grava subteno favore al la hispana Revolucio de 1936-1939, ĉar la CGT/SR aliĝis al la AIT (Internacia Asocio de la laboristoj), dum la kongreso de Berlino (1922).

La dua Mondmilito anoncos la finon de tiu konfederacio kies bilanco estas plenumota.

- El la eldonajo CNT/Pariza Regiono :

■ «La CGT establiĝas en 1946, post la dua Mondmilito, preninte la nomon «CNT» por komprenigi la idovicon kun la revolucia sindikatismo de la CGT antaŭ 1914, sed la decidiga kondukto postrestas kun la ideoj, kaj militantoj, la sperto de la CGT.»

■ La CNT vekis egajn esperojn. Pri la anoj, la nombroj estas inter 50 000 kaj 100 000. Post la Mondmilito, la CNT ĉeestis en gravaj konfliktoj - ekzemple en la firmaoj Berliet (Liona regiono), kaj ankaŭ dum la granda fama striko ĉe Renault en 1947.

Fine 1947, la CNT arigas 8 naciajn federaciojn. La laboristoj de la fervojo, tiam arigas 64 sindikatojn ĉe la pariza regiono.

Certe ja nuntempe, nia konfederacio estas malpli brila, sed ni estas tre malproksime el la marĝeneco.

Nia forto troviĝas en la ekonomia memsufiĉo, ĉar la CNT ne ricevas

ŝtatajn aŭ mastrajn subvenciojn. Ni ricevas la kotizojn, kaj abonojn por la «sindikatisma batalo» (monata gazeto).

Ofte, ni organizas festojn de la libroj. Ni ĉeestas en la manifestacioj kun niaj flagoj – ruĝaj kaj nigraj. Eĉ se ekzistis inter 1950 ĝis 1968 kelkaj internaj luktoj mi citas tiun citaĵon el la broŝuro n-ro 4 de la departementa Unuiĝo 95 «dum iuj alternaj sindikatoj estas kandidatoj por la anstataŭigo (SUD/PTT- SUD / Rail- FSU ktp), la CNT estas potenciala danĝero, kaj iuj mastroj tion bone scias».

La monata gazeto de la CNT (julio-aŭgusto 2009) sciigas la verdikton de la Ŝtatokonsilio pri la akordo-kadro de la 27a de Januaro 2006, kaj poŝta cirkulero de la 24a de marto 2006 kiu tute estas nuligitaj.

Temis pri proĥibi ĉiujn faradojn de la CNT en la Poŝtoŝicejo kiel nereprezentajn.

Tiel ekde nun, tiu verdikto samtempe estas jurisprudenca, kaj ankaŭ ebligas la agadon de la delegitoj, afiŝi, kaj disdoni niajn propagandilojn.

Do la CNT, ankoraŭ neniel estas marĝena sed bone agema.

Louis Gohin

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
dejoj-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	jaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

■ **Parolaj perfektigaj kursoj ĉe la sidejo ĉiun merkredon**, je la 16a, kun Thérèse Pinet, kaj **ĉiun jaŭdon**, je la 16a, kun Élisabeth Barbay. La preparo al la kapableco okazas **vendrede** je la 18a kun Vinko Markovo, **sabate** je la 15a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun unuan merkredon** de la monato, je la 17a kaj duono, kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2008 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2008 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Nuntempe vakas. Volontulo sin anoncu.

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vinko Markovo.

Enpaĝigisto : Serĝo Sir'.

Korektskipo : André Andrieu, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@aliceadsl.fr, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formato por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapelo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formato.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir' (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj

respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard

Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Retpoŝt-adreso: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc

38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Retpoŝt-adreso : claud.gerlat@orange.fr

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9

CH-2416 Les Brenets

Clémentine Staquet (Espéranto-Infor)

14 rue du Loutrier BE-1170 Bruxelles

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Retpoŝt-adreso : lasago@aliceadsl.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2009: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-

Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly

p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter

Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen

p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40% ĝis 5€
 35% ĝis 10€
 25% ĝis 20€
 20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00

Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La lanque internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Novajoj/Ree mendeblaj

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Aŭtoro: Lidia Zamenhof
 Ilustris: Julia Litvinova
 Fako: antologioj
 Formo: libro kudre bindita
 Paĝoj: 430
 Formato: 135 x 205 mm
 Eldonjaro: 2009
 Prezo: 24€
<http://www.esperanto.be/fel/but/lib/lidip.php>
 Priskribo: La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.



La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mondmilitoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentreje. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.

Recenzoj: Lidja Zamenhof apartenas al la idea, intelekta kaj kultura elito de la Esperanto-komunumo. Tiukaŭze tio kion ŝi postlasis devas esti alproprigita kaj konsistigi gravan parton de ĝia kulturo ... Publikigon por la unua fojo kaj en unu volumo de la kolektitaj artikoloj, paroladoj, leteroj kaj kelkaj aliaj dokumentoj plume de Lidja Zamenhof, ankaŭ kelkaj artikoloj pri ŝi, oni devas konsideri grava paso, ebliganta ne nur al la esplorantoj de la historio kaj kulturo de la Movado, sed entute al la esperantistaro konatigon kun la postlasaĵo de Lidja, avana kultur-kreintino. (Zofia Banet-Fornalowa)

... klinigante sur la vivo, sur la agado de Lidia, mi miris fronte al la pura idealismo kiu estis la ŝia. Esperanto, ne nur la lingvo, sed ĉefe ĝia Interna Ideo, kompletigata de la bahaisma Kredo, plenigis la vivon de Lidia ..., kiu dediĉis sian vivon al la estontaj pli lumaj tagoj de la homaro. (Louis C. Zaleski-Zamenhof).

La Origino de Specioj

Aŭtoro: Karolo Darvin
 Tradukis el la angla: Klivo Lendon
 Ilustris: Julia Litvinova
 Fako: sciencaj verkoj
 Formo: libro kudre bindita
 Paĝoj: 430
 Formato: 135 x 205 mm
 Eldonjaro: 2009
 Prezo: 24€

<http://www.esperanto.be/fel/but/lib/orspe.php>
 Priskribo: Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencaj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.



Aventuro en mondo de ŝajnigado

Aŭtoro: Jean Codjo
 Ilustris: Julia Litvinova
 Fako: noveloj
 Formo: libro vinktitaj
 Paĝoj: 44
 Formato: 135 x 205 mm
 Eldonjaro: 2009
 Prezo: 6€
<http://www.esperanto.be/fel/but/lib/sxaj.php>
 Priskribo: Jean Codjo, Beninano, iam naskiĝinta en fora Benina vilaĝo, sed nun instruanta en Kanado, verkis novan novelon, pri la spertoj de Afrika intelektulo en la blanka mondo. Li spertis ke diplomo havas varian pezon kaj gravecon: laŭ lando kie oni ĝin klopodas valorigi, laŭ la lando kie oni ĝin akiris, laŭ la vizaĝo aŭ koloro de la diplomito. Li ankaŭ rapide malkovras ke ne absolute ĉiuj blankuloj estas riĉaj kaj ke ili ne ĉiuj adoras la saman Dion. Iusence la nova novelo rolas kiel ŝlosilo al la antaŭuloj. Ne nur la konstatoj estas priskribitaj sed ankaŭ la evoluo de la observanto!



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Lorjak

(laŭ prelego pri humuro, kiun mi prezentis en Kondoros, Hungario, okaze de la Internacia Esperanto Konferenco)

Komence de la lasta romano de **Lorjak**, *Kromosomoj* (FEL, 1989), Aldo de 'Giorgi skribas: «Lorjak, la mistera verkisto. Mistera dum longa tempo, almenaŭ por la neinicitoj, almenaŭ ĝis kiam li permesis malsekretigi sian identecon: Jean-Louis Mahé, parizano, laŭprofesie fotisto, siatempe disfamiĝinta kiel aŭtoro de la unua originala, longdaŭra filmo en Esperantujo: *Angoroj*.

En la verka kampo Lorjak debutis (laŭ mia scio) en la unua parto de la sepdekaj jaroj, pere de iuj rakontoj en kelkaj gazetoj. Lia unua romano,

Neologisme, aperis en 1975. Kaj tuj nia kritikistaro miris, iom perpleksiĝis sed fine laŭdis. Foje apologie. [Mi opinias ke Aldo de 'Giorgi iom troigas, ĉar mi malofte legis apologian recenzon de verko de Lorjak!] Pro la surprize nekutima temo en esperantista fono, pro la piroteknike aŭdaca lingvaĵo, pro la tipe franca, ĵongle sprita humuro. La postan jaron sekvis *Transe*, denove malŝablona temo, neverŝajna sed nepre originala intrigo, eksplodo de senbrida fantazio. Kaj sekve, intermite, pli-malpli ĉiun duan jaron, jen *Retoj*, *Regulus*, *Iluzioj* (novelaro), *Eŭlalia*, *Mariagnes*.

... Sed ne tro fidu la seriozecon de la temoj; Lorjak ja estas iele Schwartz-disĉiplo...

Leĝera, distra literaturo, oni diras. Ja, povas esti, sed en ĉiu literaturo tiaĝenraj verkoj svarmas. Kaj furoras. Krome, en ĉiu verko de Lorjak Esperanto – kaj tipe Esperanta etoso – signife rolas, dise, spice. Kiu asertis, ke originale, aŭtonome Esperanta kulturo ne ekzistas?»

Tiujn liniojn mi volis aperigi, ĉar mi opinias, ke Lorjak neniam ricevis la merititan agnoskon de sia literatura talento. Kvazaŭ post Schwartz ne plu estus loko por humoristo! Kaj same kiel Schwartz cetere, Lorjak ne nur verkis fantaziajn romanojn, kaj Regulus kaj Mariagnes estas sendube iuj el la plej belaj historiaj kaj amaj romanoj de nia literaturo.

Jen nun resumeto, pli ĝuste kelkaj trajtoj de la plej fantazia romano de Lorjak Eŭlalia.

La juna Eŭlalia laboras en uzino, kies estroj estas S-ro Gropin kaj S-ro Moĵan (vi certe memoras, ke Emilo Grosjean-Maupin estas la aŭtoro de la Plena vortaro, prototipo de nia Nova PIV...). Lu submastro nomiĝas Hipolit Eratur...

Bona trovaĵo, kvankam ne speciale humura: «ĉu do je la nunioma horo vi ankoraŭ ne tagmanĝis?

Kiam Django estas mortonta, li kunigis siajn fortojn por balbuti vorton unikan, sed utilan: –Jules... Post tio, li nekompreneble gargarbruis en sia ŝajne revenanta gepatra idiomo. Ĝis, dum lastega skuo, li stertoris: – Ha! – en cigana lingvo.

Poste alvenas Edmon Tenegro sindikata sekretario de la uzino Moĵan-Gropin.

Juveleto en formo de kokoso (medaliono) ludas gravan rolon en la romano. En tiu medaliono troviĝas la foto de la nekonata patro de Eŭlalia. Ĉar aĉulo volas ŝteli tiun medalionon, necesas ŝanĝi la foton. Plej taŭgas portreto de Azenbravur, la furora kantisto...

La inspektoro Leonard volas trovi la aĉulon, Jules. Tiam li iras en hotelon kun Kiki Zanzibar, kiu laboras por la prostituisto. Dum Kiki malvestiĝas, Leonard cerbumas por konduki la konversacion al tiu Jules, kaj plilongigi la tempon:

– Sed... ĉu tie vi kaŝas vian ŝamisenon?

– Mian kion?

– Vian ŝamisenon...

– Komprenas ne.

– Kiel vi ne komprenas? Ĉu vi ne estas, belulino kara, mia okcidenta geĵŝo? Kaj ĉu la geĵŝoj ne kutimas amuzi gastojn perdancado, kantado, kaj ludo de ŝamisenon? ...kvankam mi ne scias kio estas ŝamisenon. Sed tion mi legis en iu ilustrita plena vortaro, kiun eventuale mi volonte donacus al vi...

Aliflanke de la ekranego, kie ŝi masaĝis la postsignojn de sia gaino, Kiki Zanzibar komencis malkvietiĝi:

–Vortaro! Kion mi kreskigos per vortaro? Komencu per saltosendo de mia mono.

Sed ve la firmao de Gropin-Moĵan bankrotas. Pro freneza sumo de telefono: 800 milionoj da planedoj!


Kiel tio povis okazi, jen la klarigo: «Sinjoro, vi diskis numeron en Tokio, por konversacio kiu daŭris ses monatojn. Vi ŝuldas 259.204 minutojn, sur la bazo de tridek planedonoj minute. Do, entute septe sepdek sep milionoj kaj sescent mil malnovajn planedojn.» – Antaŭ ol forlasi la terenon, tiu malbenita Kokcinela (forlasita amantino de S-ro Gropin) estis vokinta la parolantan horloĝon de Tokio, kaj foririnte lasis la telefonon malkroĉita. Kaj ĝi restis tia dum ses monatoj.

Je la fino, oni ekscias ke la vera nomo de Edmon Tenegro estas fakte Tevideo... Edmon Tevideo! Aldone jen postparolo de la aŭtoro al la legintoj de la antaŭparolo; – Ne protestu. Vi estis avertitaj.

Jak Le Puil



Kiel esperantigi proprajn nomojn -10-



Blazono de Ĉatoverdo (83) :

El oro, kun kastelo el sinoplo.

«Laŭnomaj blazonoj» estas laŭnomaj ĝenerale nur en siaj originalaj naci-lingvoj...

Serĝo

Hodiaŭ mi konsideros la grupon **-ch-**, kiu en la franca lingvo ĝenerale prononciĝas kiel la Esperanta **ĉ**. En la Esperantaj vortoj el franca fonto, plej ofte **ĉ** respondas al la franca **ch**. Ekzemploj abundas; mi citos nur kelkajn. La komunaj vortoj citotaj estas ĉiuj fundamentaj; mi aldonos kelkajn proprajn nomojn troveblajn en PIV: **aĉeti, branĉo, ĉevalo, ĉapelo, ĉasi, Ĉampanjo, Ĉarloto, Ĉaŭdefono, Ĉerburgo, dimanĉo, Franĉkonteo, kapuĉo, kraĉi, maĉi, meĉo, perĉo, riĉa, Roĉelo, torĉo, tranĉi**. Tio faciligas la skriban rekoneblecon, precipe kiam **ch** estas ĉe la komenco de

la vorto; efektive tiel la alfabeto estas konservita. Multaj propraj nomoj estas oportune esperantigeblaj tiel, precipe la mallongaj. En la ĉi-subaj ekzemploj de geografiaj nomoj, mi proponos esperantigi la vorton «château» per «**ĉato**», kvankam en la nomo de loĝantoj ofte aperas la radiko «castel» aŭ «castro», ĉar mi opinias ke la komenco «ĉato» estas pli facile rekonebla, kaj skribe kaj parole; mi eventuale aldonos la nomon de la loĝantoj, post suprenstreko, ĉar tiu nomo foje sugestas esperantigon (tutan aŭ partan) de la urbonomo:

Altkirch / altkirchois.	Altkirĉo.
Aniche / anichois.	Aniĉo.
Auch / auscitains.	Aŭĉo.
Bitche / bitchois.	Biĉo.
Cachan / cachanais.	Kaĉano.
Chaillot.	Ĉaljoto.
Challans / chalandais.	Ĉalando.
Challes-les-Eaux / challésiens.	Ĉalezeo.
Châlons-en-Champagne / châlonnais.	Ĉalono ĉampanja.
Chalons-sur-Saône / chalonais.	Ĉalono ĉe Saono.
Châlus / châlusiens.	Ĉaluzo.
Chamalières / chamalierois.	Ĉamaljero.
Chambéry / chambériens.	Ĉamberio.
Champigny-sur-Marne / campinois.	Ĉampinio ĉe Marno.
Chanteloup.	Ĉantelupo.
Chantilly / cantiliens.	Ĉantilio.
Charente.	Ĉarento.
Charleroi / carolorégiens.	Ĉarlerajo.
Charleville-Mézières / carolomacériens.	Ĉarlevil-Mezjero.
Charlieu / charliandins.	Ĉarlio.
Charmes / charmois.	Ĉarmo.
Chartres / chartrais.	Ĉartro.
Châteaubriant / castelbriantais.	Ĉatobrianto.
Château-du-Loir / castéloriens.	Ĉatodeloaro.
Châteaudun / dunois.	Ĉatoduno.
Châteaugiron / châteaugironnais.	Ĉatoĝirono.
Château-Landon / châteaulandonnais.	Ĉatolandono.
Châteaulin / castellinois / châteaulinois.	Ĉatoleno.
Châteauneuf / castelneuvois / castelnoviens.	Ĉatonovo.
Château-Renault / renaudins.	Ĉatoreno.
Châteauroux / castelroussins.	Ĉatoruso.

Château-Salins / castelsalinois.	Ĉatosaleno.
Château-Thierry / astroteodoriciens.	Ĉatotjerio.
Châtelaillon / châtelaillonais.	Ĉatelaljono.
Châtelguyon / châtelguyonnais.	Ĉatelgujono.
Châtellerauld / châtelleraudais.	Ĉatelero.
Châtenay-Malabry / châtenaisiens.	Ĉatene-Malabrio.
Châtillon / châtillonais.	Ĉatiljono.
Chatou / catoviens.	Ĉatuo.
La Châtre / castrais.	Laĉatro.
Chaudes-Aigues / Caldaguésiens.	Ĉaŭdajgo.
Chauffailles / chauffaillons.	Ĉaŭfajlo.
Chauny / chaunois.	Ĉaŭnio.
Chennevières / canaverais.	Ĉenevjero.
Chenonceaux.	Ĉenonceo.
Le Chesnay / chesnaysiens.	Ĉesnajo.
Grand-Champ / grégamistes.	Granĉampo.
Les Houches / houchards.	Lahuĉo.
Luchon.	Luĉono.
Maïche.	Majĉo.
Millevaches.	Milvaĉo.
Montech.	Monteĉo.
Ouche.	Uĉo.
Pech-Merle.	Peĉmerlo.
La Rochette / rochettois.	Roĉeto.
Rouchin.	Ruĉeno.
Saint-Chamond / saint-chamonais.	San-Ĉamono.
Saint-Chély.	San-Ĉelio.
Senonches / senonchois.	Senonĉo.
Tinchebray / tinchebrayens.	Tinĉebrajo.
La Tranche-sur-Mer / tranchais.	Tranĉo-ĉe-Mar.
Uzerche.	Uzerĉo.
Vauche.	Vaŭĉo.
Veauce.	Veoĉo.
Vichy.	Viĉio.
Viry-Châtillon / castelvirois.	Viriĉatiljono.

Nun venas kelkaj ekzemploj de familiaj nomoj esperantigitaj sammaniere:

Achard.	Aĉardo.
Bichat.	Biĉato.
Chabrol.	Ĉabrolo.
Champollion.	Ĉampoljono.
Chaplin.	Ĉapleno.
Charlebois.	Ĉarlebojo.
Charpentier.	Ĉarpentjero.
Châteaubriand.	Ĉatobriando.
Chénier.	Ĉeniero.
Chirac.	Ĉirako.
Coluche.	Koluĉo.
Duchesne.	Duĉesno.
Le Chatelier.	Ĉateljero.
Rachel.	Raĉelo.
Richelieu.	Riĉelio.
Rouch.	Ruĉo.

En aliaj okazoj, la **ch** de la franca vorto fariĝas **ŝ** en Esperanto. Jen kelkaj ekzemploj de fundamentaj komunaj vortoj, kaj de propraj nomoj troveblaj en PIV: **akuŝi, artiŝoko, Bomarŝeo, broŝuro, buŝo, duŝo, eŝafodo, Freŝeo, kaŝi, Koŝio, kuŝi, Laroŝfuko, marŝi, maŝino, poŝo, ŝakalo, ŝanĝi, ŝopeno, ŝvarco, tuŝi.** Tiaj esperantigoj praviĝas en kelkaj kazoj por eviti homonimojn (ekz. buŝo kaj buĉi, kaŝi kaj kaĉo), en aliaj per la ortografio de la franca vorto, kiu komenciĝas per **Sch** (ekz. *Schwartz*), en aliaj per la longo de la vorto skribe rekonebla malgraŭ la fonetika esperantigo (ekz. *La Rochefoucauld*). En aliaj vortoj **ŝ** ŝajnas elektita arbitre, aŭ pro la fakto, ke la vorto ne devenas de la franca, kvankam ĝi similas francan vorton; en la ĉi-supraj propraj nomoj,

kelkaj **ŝ** devenas de la «fonetisma skolo», kiu favoras la parolan rekoneblecon, koste de la skriba (ekz. Koŝio). Ĉi-sube estas kelkaj ekzemploj de nomoj, kiujn mi proponas esperantigi tiel:

Arcachon.	Arkaŝono.
Deschamps.	Deŝampo.
Deschanel.	Deŝanelo.
Leclanché.	Leklanŝeo.
Marchais.	Marŝeo.
Michelin.	Miŝleno.
Rochechouart / rochechouartais.	Roŝeŝuarto.
Rochefort.	Roŝforto.
La Roche-Posay.	Laroŝpozeo.
Rocheservière.	Roŝeservjero.
La Roche-sur-Yon.	Laroŝo-ĉe-Jono.
Schirmeck / schirmeckois.	Ŝirmeko.
Schmitt.	Ŝmito.
Schneider.	Ŝneder.
Schweitzer.	Ŝvejzero.
Suchet.	Suŝeto.
Taschereau.	Taŝereo.
Zachée.	Zaŝeo.

En tria grupo da vortoj, la franca **ch** fariĝas **k** en Esperanto. Tio estas malofa, kiam **ch** estas prononcata **ŝ**, ekz. **kapelo, planko, Karolo, Mikaelo, Rikardo**, sed regula kiam **ch** estas prononcata **k**, ekz. **Kristo, Makiavelo, Zakario**. Analoge mi proponas:

Hochfelden.	Hokfeldo.
Hondschoote.	Hondskoto.
Ploumanac'h.	Plumanako.

En la sama grupo mi aldonas *La Chaise-Dieu*, latine *Casa dei* (dometo de Dio), kies loĝantoj estas nomataj *Casadéens*:

La Chaise-Dieu.	Kazadeo.
-----------------	-----------------

Por la multnombraj lokoj nomataj *La Chapelle*, mi analoge proponas **Lakapelo**'n, ekz.:

La Chapelle-la-Reine.	Lakapelo Reĝina.
La Chapelle-en-Vercors.	Lakapelo Verkora.
La Chapelle-aux-Saints.	Lakapelo Sanktula.

Por nomoj, kiuj finiĝas per «*le Château*» kaj per «*l'Église*», mi proponas uzi nom-epitetojn, ekz.:

Sévérac-le-Château.	Severako Kastela.
Onet-le-Château.	Oneto Kastela.
Onet-l'Église.	Oneto Kirka.

En kvara grupo troviĝas nomoj, komune uzataj en la franca lingvo sed el greka aŭ ĝermana fonto, en kiuj **ch** fariĝas **ĥ**, kiel en la komunaj nomoj **eĥo, ĥaoso, ĥimero** aŭ **ĥoro**:

Achéron.	Aĥerono.
Achille.	Aĥilo.
Schlucht.	Ŝluĥto.

Resume, la komuna esperantigo de la franclingva **ch** estas **ĉ**, sed en kelkaj okazoj **ŝ** estas pli oportuna, kaj en esceptaj okazoj **k**, kaj eĉ **ĥ**.

Andreo Andrio.

Duonjarcenta debato

Tial ke kelkaj esperantistoj ankoraŭ dubas pri la utileco de la esperantigo de propraj nomoj, mi tuj citos eltiraĵon de la «*Memuaro pri geografiaj nomoj*» prezentita en Aŭgusto 1959 en Varsovio dum la 44a Universala Kongreso de Esperanto. Tiu citaĵo de Avoto (*Alexander W. Thomson*) montros, ke la debato ne estas nova. Jen la eltiraĵo:

lu diris al mi: «Kial vi ĝenas vin pri geografiaj nomoj? La solvo estas simpla. Ni nur bezonas esperantigi la plej vaste konatajn nomojn, La ceterajn ni skribu laŭ ilia nacia ortografio, kaj prononcu laŭvole. Ĉiu nacia lingvo faras tiel sen troa ĝeno -- kial ne ni?» Jen, karaj geamikoj, estas eraro. Ĉu vere tio, kio taŭgas por nacia lingvo, taŭgas ankaŭ por internacia? Pli zorga pripensu montras ke ne. La rolo de internacia lingvo estas interkomprenigi personojn, kies lingvaj kutimoj,

parolmanieroj, kaj eĉ alfabetoj, estas tre diversaj. Tia rolo postulas multe pli altan gradon de precizeco, ol bezonas la ĉiutaga babilado de samlingvanoj. Du britoj kredeble misprononcus germanan nomon proksimume same, kaj povus aludi ĝin konversacie sen miskompreno. Tamen franco misprononcus ĝin tute alimaniere, kaj eĉ ne rekonus ĝin el la buŝoj de britoj. Imagu ankaŭ hindan komizon, kies gepatra skribmaniero similas dancantajn lumbrikojn, kaj kiu scias nenian latinliteran lingvon krom Esperanto. Balbute li penas komuniki al japana kolego loknomon, kiu estas tute ne eldirebla laŭ esperantaj reguloj. La rezultoj estas unue reciproka embaraso, kaj due forta bato kontraŭ la prestiĝo de nia internacia lingvo!.....

.....ĉi tiu kunveno ne sin koncernas pri personaj nomoj. Mi opinias, ke kiam persono eniras la landon Esperantujo, li rajtas alpreni esperantan nomon.

AA

Esperantistoj aktivas

Chateauroux (36)

Espéranto-Indre kaj *La Maison des Droits de l'Enfant* (Domo de la Infanaj Rajtoj) partoprenos novembre 2009 en granda festo pri neperforto kune kun aliaj asocioj.

Alvoko al la Infanoj

kiuj volas vivi en frateca,
solidara kaj justa Mondo



Kampanjo de la Infanoj por Senperforta Mondo

Asertu vian volon skribante vian propran mesaĝon
kaj iĝu ambasadorojn de neperforto diskonigante
tiun alvokon ĉirkaŭ vi.

por ĉiu informo:

MAISON DES DROITS DE L'ENFANT
28 rue de l'écho

ESPERANTO-INDRE
Maison des associations
36000 Chateauroux (France)

Deveno de la projekto:

En la jaro 1999, kvin infanoj naskiĝintaj en Chateauroux (Francio) la tagon de la subskribo de la Internacia Konvencio pri la Infanaj Rajtoj pere de UNO, decidis sendi amikecan mesaĝon al ĉiuj infanoj de la Mondo.

La bona sukceso alportis respondojn el pli ol 70 landoj.

Dek jarojn poste, por la dudeka datreveno de la Konvencio, la Domo de la Infanaj Rajtoj kuraĝigas la nuntempajn infanojn, kiuj bonvolas agi kontraŭ ĉiaj perfortoj.

Tial la asocio Domo de la Infanaj Rajtoj de Chateauroux kaj la asocio Esperanto-Indre kuniĝis por diskonigi novan alvokon.

Ĉefaj celoj:

kuraĝigi la infanojn esprimi siajn opiniojn kaj partopreni en la publika vivo laŭ la agnoskitaj Rajtoj de la Internacia Konvencio de la Infanaj Rajtoj. Art.12, 13 kaj 15);

uzi kaj promocii Esperanton kiel internacian lingvon por faciligi komunikadon kaj komprenon inter la diversaj popoloj de la planedo;

kontribui al konstruado de paca kaj solidareca Mondo.

La diversaj fazoj de la projekto:

1- Diskonigi, kiel eble plej larĝscale, tiun unuan mesaĝon:

«Mi, infano de la planedo Tero, asertas mian volon vivi en senperforta, frateca, solidareca kaj justa Mondo. Mi min devontigas apliki tiun vivarton kaj batali kontraŭ ĉiaj sentoleremoj tiom minacaj por la homaro.

2- Inviti la infanojn redakti sian propran mesaĝon sub la formo kiu taŭgas al ili: teksto kun aŭ sen desegnaĵo, foto, ktp.

Skribu la aĝon kaj la poŝtadreson malantaŭ la verko.

3- Sendi la novan mesaĝon en via gepetra lingvo kaj en Esperanto al unu el la subaj adresoj.

Bonvolu diskonigi vian novan mesaĝon ĉirkaŭ vi.

4- Membroj de la du asocioj elektos la plej interesajn sendaĵojn

por: - Ekspozicio

- Eldonado de multlingva libreto (en la originala lingvo kaj en esperanto).

Tiu libreto estos donacita al la aŭtoroj de la elektitaj verkoj. Ĝi povos esti tradukita en la lingvon de la partoprenantoj.

5- Plie, la Domo de la Infanaj Rajtoj sin devontigas transdoni ĉiujn ricevitaĵajn mesaĝojn al la Internaciaj Organizaĵoj kiuj zorgas pri protektado de la infanoj kaj pri paco en la Mondo.

Kalendaro:

Necesas ricevi la mesaĝojn antaŭ la unua de novembro 2009.

Ĉiuj partoprenantoj estos bonvenaj.

Transdonis Maryvonne Houviez

Maison des Droits de l'Enfant
28 rue de l'écho, 36000 Chateauroux
tél. : 02.54.61.52.14
mde.chateauroux@free.fr
maisondesdroitsdelenfant.ouvaton.org

ESPERANTO-INDRE
Maison des associations, 36000 Chateauroux
tél. : 02.54.27.95.51
esperanto.indre@esperanto-indre.com

Bouresse (86)

KVINPETALO :

Sabaton la 11-an kaj dimanĉon la 12-an de julio, okazis en Kvinpetalo (Bouresse, 86) omaĝo al Georges Lagrange, kvin jarojn post lia forpaso.

Sabaton vespere okazis la unua parto de la omaĝo.

Dum la tuta tago, oni povis malkovri aŭ retrovi diversajn aspektojn de la vivo aŭ personeco de Georges, per fotoj kaj tekstoj prezentitaj en la «subtegmento» (antaŭa ŝirmita parkejo).

Oni povis laŭvole spekti memoraĵojn pri la prezento de la teatraĵo «Kia miksaĵo» en 1992, en la urba salono de Bouresse.

En la vespero, estis pluraj prelegetoj pri la vivo kaj verko de Georges.

Michel Duc-Goninaz (supra foto) elvokis la memlernintan gramatikiston, kaj ties rolon ene de la Akademio kaj de Franca Esperanto-Instituto.

Poste Martine Rivière (meza foto) legis tradukojn, kiujn Georges verkis de francaj poemoj.

Bernard kaj Arno Lagrange (suba foto) rakontis pri sia infanaĝo, siaj memoraĵoj de «denaskaj esperantistoj» kaj petis reagojn de la publiko. Pluraj ĉeestantoj rakontis siajn proprajn spertojn de denaskaj esperantistoj, kaj ni povis konstati, ke tiuj estas ege malsimilaj, kaj ke esperantista denaskiĝo povas foje alporti kaj feliĉon kaj malfeliĉon.

Grandan emocion vekis tiu omaĝo

Bouresse (86)

KVINPETALO :

La 23an de Aŭgusto 2009, la lasta tago de la muzika staĝo en Bures.

Ĉijare ni venis ne kiel muzikistinoj sed kiel kuiristinoj. Unue de la 9a ĝis la 15a de Aŭgusto ni zorgis pri la kuirado dum staĝo pri **Tradukado** gvidita de Claude Gerlat, kiu partoprenis en la vojaĝo al Bialistoko per Verda Bus'. Ŝanco por ni. Pro malmultaj staĝanoj ni al kutimiĝis al nia laboro.

Kiam alvenis la muzikaj staĝanoj, pli nombraj ol la partoprenantoj de la antaŭa staĝo, ni multe laboris por nutri tiujn bonapetitemajn junulojn. Tiu ĉi staĝo dispartiĝis inter praktikado de Esperanto, instrumentaj muzikaĵoj kaj kantoj el diversaj landoj.

Matene ankaŭ ni partoprenis al la prelego kaj al la parolado. Ni kune prezentis la ribelon de la soldatoj de la 17a regimento en 1907 en nia regiono Langvedoko-Rusiljono. Ĉiuj interesiĝis pri nia rakonto.

Omaĝo al Georges Lagrange

vespero, kiu preparis al eĉ pli granda la sekvan tagon.

Efektive, de du tagoj ĉeestis en Bouresse kvardeko da anoj de la koruso Interkant', kiuj devis, sub la gvidado de Franjo Leveque, prezenti dimanĉon posttagmeze naŭ kantojn el la Kanto Generala de Pablo Neruda (muziko de Mikis Theodorakis), esperantigitaj fare de Georges Lagrange.

Kvaronon antaŭ la kvina, la preĝejo de Bouresse estis jam plenplena. Spektantoj alvenis de la vilaĝo mem, sed ankaŭ de pli malproksime. La parkejo rapide pleniĝis. Ĉeestis ankaŭ esperantistoj, kiuj partoprenis en la ĵus finiĝinta staĝo, aŭ kiuj loĝis en la regiono.

Ekde la komenco la etoso estis instalita. Eĉ se tiu verko estas kutime kantata de korusoj pli grandaj (pli ol 100 korusanoj, ĝenerale), Franjo Leveque kaj Interkant' sukcesis esti en la aŭskultantaro vibran emocion, kiu estis preskaŭ palpebla. La basa voĉo de Jacques Yvart, kiu ludis la rakontanton, la korŝira voĉo de la solistino Maya, kaj tiu, varma kaj profunda, de la solisto FaMo (apuda foto) belege

harmoniiĝis kun la koruso kaj la malmultnombraj sed elstaraj muzikistoj. Ĉiuj ja komunikis la forton kaj subtilon de la muziko de Theodorakis. La vortojn mem oni povis bone aŭdi, kaj per ili rekoni la ribelan forton de la poemoj.

Je la fino de la prezento, la koruson la ĉeestantaro longe star-aplaŭdis.

La korusestrino proponis, ke la koruso redonu la kanton «Nia Tero», el kiu la unuaj vortoj estis disdonitaj al la ĉeestantoj, kun ero de la partituro, en la programo. Tiel, daŭre starante, ĉiuj povis kunkanti parton de tiu kanto kun la koruso. Franjo alterne turnis sin al la publiko aŭ al la koruso kaj la muzikistoj, kaj tio kreis ege familieran etoson. En la publiko (same kiel en la koruso mem, laŭ kelkaj korusanoj...) maleblis kunkanti, ĉar la voĉon ŝiris la emociigo.

Estas notinde, ke la koruso en tiu okazo faris sian unuan prezenton de sia Kanto Ĝenerala. Estis ja plensukceso!

Splenda omaĝo estis al Georges. Ĝi tre verŝajne lasos neforviŝeblan memoron en la koro de ĉiuj, kiuj ĉeestis.

Janine Dumoulin

Parteto de tiu koncerto estas aŭdebla kaj videbla je tiu adreso:

http://www.youtube.com/watch?v=61cl0fsu_-Y&hl=fr



Muzika staĝo

Ili ankaŭ aŭskultis vitistajn kantojn kaj la faman kanton pri la soldatoj de la 17a regimnto. Eblas, ke venontan jaron ni kune kantos ĝin en esperanto.

La fluto restis la plej uzata ilo por ludi diversajn muzikaĵojn: baroka, popola, romantika stilo. Ni eĉ kune kantis kaj ludis etan parton de la «Canto General» de Mikis Theodorakis, laŭ la poemo de P. Neruda. La junuloj adaptis amuzan parodion de nuntempa muzika komedio. Ili elektis ĝin en la repertuaro de la Kompanio «Jolie Môme» kaj ili prezentis ĝin dum la koncerto de la fino de la staĝo kun granda sukceso.

La spektantoj de Bures multe aŭskultis, ridis kaj forte aplaŭdis. Poste ili gratulis la artistojn.

La ĝenerala etoso tre agrabla plaĉis al ni kaj ni plezure kuiradis.

La gastantoj ŝatis niajn pladojn. Neniame ni havis restaĵojn. Ĉar la suno brilis ĉiutage, ni kune manĝis ekstere en la apuda ĝardeno.

La prezidanto de la Societo Yvonne Martinot, Brian Moon, restadis du tagojn kun ni kaj li estis kontenta pri la staĝo.

Dum la bilanco, ni pripensis pri la rimedoj por plibonigi kaj reklami la staĝon 2010. Jam la estraro kaj la staĝantoj deziras, ke ni revenu, ĉar... nia kukurbeta kaĉo estas tre kaj tro bona.

Nun la staĝo finita, ni pripensas pri niaj agadoj en Béziers.

**Line Maurel
kaj
Geneviève Gaubert**





Korusumi en Bouresse

La 11an/12an de julio 2009, Kvinpetalo organizis omaĝon al Georges Lagrange laŭ la propono de Bernard Lagrange.

Kadre de tiu omaĝo, la interregiona esperanta koruso «Interkant'» unuafoje interpretis esperantan version de «*Canto general*» verkita de Pablo Neruda, muzikigita de Mikis Theodorakis.

Tiun dimanĉon, la 12an de julio je la 17h, la preĝejo de Bouresse pleniĝis pro alveno de 50 kantistoj, muzikistoj, deklamanto, sonteknikisto kaj 130 spektantoj.

Ĉu la ideo kanti en preĝejo plaĉus al Georges Lagrange, des pli kiel omaĝo al li kaj lia verkado?

Ĉu ni pravus uzi tiun lokon pro ĝia bona akustiko, ĝia spaco, ne forgesante ke laboristoj ŝvitis por konstrui ĝin je la nomo de iu, en kiu mi tute ne kredas?

Kanti sub la foto de papo, unue ĝenis min. Sed, post kiam Lino, nia pianisto, asertis ke staras nur la foto de lia onklo, mi konsciis, ke tiu publika loko en tia cirkonstanco estas la plej taŭga.

Kiel kvazaŭ duono de la korusanoj, neniam en mia vivo, mi spertis tian aventuron kanti antaŭ publiko kaj travivi tian etoson.

Estis intensa plezuro, dum 10 monatoj, prepari en Parizo, en Le Mans, en Bretonio tiun oratorion, kiam mi akompanis nian karan ĥorestrinon, Franjo.

Alia plezuro, kiam ŝi kunigis la kantistojn, kiuj provkantis en sia regiona grupo kaj eĉ sole en Normandio aŭ en Brive: en junio en Le Mans kaj ĉi tiun semajnfino en Bouresse.

Laŭ peto de Franjo kaj Manjo, en 1999, Georges Lagrange esperantigis 9 poemojn el tiu verko «*Canto general*». Sed tiam, la projekto kantigi ilin ne konkretiĝis. Franjo decidis en 2008 ne lasi tiun imponan laboron pluripozi en tirkesto.

Pluraj esperantistoj tute ne kredis en tia ampleksa projekto. Pluraj kantistoj dubis ke ili sukcesos atingi la celon iam koncerti.

Plurfoje, Franjo diris al mi ke koncerti ne interesas ŝin, se ŝi ne trafas la koron de la publiko. Ĉi tiun dimanĉon, ne nur ties publikon, sed ankaŭ la koron de la korusanoj, ŝi-ni emociigis. Plurfoje, mi sentis vibradojn, kantante en tiu ĥorejo de la preĝejo, aŭ aŭdante gesolistojn kaj profundajn silentojn. Eĉ se mi eraris pri kelkaj notoj, mi sentis iun harmonion ne nur inter la ĥoranoj, sed ankaŭ kun la publiko al kiu mi sendis la sonojn de mia voĉo.

Fine de la koncerto, kiam la publiko aplaŭdis kaj postulis pluan kanton, Franjo sukcesis starigi ĉiujn spektantojn. Sorirante sur benkon, ŝi nekredeble gvidis la du korusojn: «Interkant'»-on kaj la publikon,

kiu kantis la refrejon «Nia tero, vasta tero...» el «Ameriko insurgenta».

Mi ne provis malhelpi larmojn invadi miajn vangojn, tiujn ĝoj-plezurlarmojn.

Post la koncerto, mi ŝatis renkonti, interŝanĝi kun kelkaj spektantoj. Venis el Bouresse, najbaroj kaj el diversaj ĉirkaŭaj ĥorusoj, pluraj kantistoj por aŭskulti tiun famkonatan verkon.

Mi respondis al kutimaj demandoj pri Esperanto: «Kio estas Esperanto?». «Ĉu Franjo estas greka pro uzado de sia fremda lingvo?». «Jacques Yvart certe ne estas greka, sed el kiu lando li venas?».

Fakte iu, kiu parolas fremdan lingvon, nepre estas konsiderata kiel fremdulo. Sed pri Esperanto, la mistero pri la lando daŭras... ĉu sennaciece?

«Kiu estis tiu Georges Lagrange?». «Ĉu li vivis en nia regiono?».

«Mia praonklo estis esperantisto en Parizo; do verŝajne, li renkontis Georges Lagrange-n kiam li loĝis samurbe».

«Fine de la koncerto, mi plezure provis kanti la refrejon kun vi». «Nepre, danku vian eksterordinaran ĥorestrinon kaj konservu ŝin».

«Des pli ke ŝi estas mia kunulino», mi tuj respondis.

Guy Martin

